

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



En la numero:

SPECIALA
PACPREMIO
DE UEA

BEA ANTAŬ LA XIII
KONGRESO
DE BKP


KOMPUTILOJ
KAJ
ESPERANTO

71-a UK
DE ESPERANTO

RIĈA
ELDONAGADO

105-JARA
DATREVENO
DE JOVKOV

NI RECENZAS



Speciala pacpremio de UEA



La Belartaj Konkursoj jam dum 35 jaroj servis kiel valora instigilo por nia vivanta literaturo. Por ke ili daŭre restu tio, ni devas respekti ilian tradician rolon kaj klopodi laŭeble alte teni la kriteriojn, kiuj devas tie validi.

Pacpremio: Por 1986 funkcios aparta branĉo, laŭ decido de la Komitato de UEA, por pacpremio. Por ĝi estas invitataj konkursaĵoj prozaj, poeziaj kaj teatraĵaj, kiuj inde pri-traktas pacon kiel ĉeftemon en arta maniero. Ĉiu konkursaĵo estu signita per la vorto „Paco“. Nur unu premio estos aljuĝita en ĉi tiu branĉo.

Konkursaj detaloj: Rajtas konkursi ĉiu, kiu ne gajnis dum la tri tuj antaŭaj jaroj unuan premion en la branĉo, por kiu ŝi aŭ li konkursas. Unu persono povas partopreni per maksimume tri verkoj en ĉiu literatura branĉo.

Poezio: Sen fiksita maksimuma longo de konkursaĵo. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo de konkursaĵo 200×65 trajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma ludodaŭro 25 minutoj. Tri premioj.

Eseo: Temo lingva, literatura, historia aŭ sociologia preferas en ligo kun la Internacia Lingvo. Longo ĉ. 400×65 trajpospacoj. Unu premio (Premio Luigi Minnaja).

Infanlibro de la Jaro: Oni rajtas proponi ĉiujn infanlibrojn, kiuj aperis dum la jaro 1985, originalajn kaj tradukitajn. Unu premio.

Fotografio: Minimuma formato 13×18 cm. Fotoj povas esti nigra-blankaj aŭ koloraj. Tri premioj.

Kanto: ekfunkcias kiel branĉo en la Belartaj Konkursoj de UEA ekde 1984. Ĝia iniciatinto estas s-ro Ahn Song-san el Seulo, Korea Respubliko, kiu donacis monsumon, per kies rento premiigos ĉiujare unu verko. La premio nomiĝas „Premio An-okin Korea pri Kanto“. La sekvaj kondiĉoj validas por tiu ĉi branĉo:

1. Teksto kaj melodio devas ambaŭ esti novaj kaj ankoraŭ ne publikigitaj;
2. Teksto kaj melodio povas esti verkitaj de malsamaj aŭtoroj;
3. Teksto kaj muziknotoj estu senditaj en po kvar ekzempleroj al la sekretario de la Bel-

artaj Konkursoj kaj devas lin atingi plej malfrue la 31-an de marto 1986;

4. La kanto premiita estu publike prezentita de kantisto aŭ ĥoro se eble en la koncerna UK, kaj en kazo de neeblo, en la postjara UK;

Reguloj: La konkursaĵoj en la branĉoj poezia, proza, teatraĵa kaj kanta devas esti senditaj en kvar ekzempleroj al la adreso: S-ro Alec Venture, 22 A Grosvenor Road, Wallington, Surrey, Britio SM6 OEF, kaj devas atingi lin plej malfrue la 31-an de marto 1986. Por la branĉo Infanlibro de la Jaro oni sendu tri ekzemplerojn de la koncerna libro al la adreso de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, same ĝis la 31-a de marto 1986. En la branĉo Fotografio sufiĉas sendi unu ekzempleron de ĉiu konkursaĵo al la adreso de Loka Kongresa Komitato (p/a Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, Beijing, Ĉinio), tiel ke la sendaĵo atingu tiun adreson antaŭ la 1-a de julio 1986.

La konkursaĵoj (escepte de la infanlibroj) devas esti signitaj per pseŭdonimo; en aparta koverto estu indiko de tiu pseŭdonimo kun nomo kaj adreso de la konkursanto. Se tion permesas la poŝtaj reguloj de la koncerna lando, oni aldonu po 5 ĝuste stampitajn internaciajn respond-kuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkursas. Sur ĉiuj konkursaĵoj estu klare indikita la konkursa branĉo.

Nevalidaj por la Konkursoj estas verkoj aperiintaj en presa formo. Ĉiu konkursanto konsentas, ke la rajto pri la unua presigo de premiita verko apartenas al UEA, kaj devigas sin ne publikigi ĝin aliloke, krom se UEA rifuzas la presigon. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, sed tiu konsentas cedi ĝis senpage okaze de eldono de almanako aŭ antologio de la Belartaj Konkursoj; kondiĉe ke ĝi aperu kun la aprobo de UEA.

La gajnintoj normale legas aŭ legigas la premiitajn verkojn dum aparta kongresa aranĝo. La teatraĵetoj povas esti ludataj aŭ legataj. Oni okazigas ekspozicion de la premiitaj fotoj. Se eble, oni poste publikigas aŭ reproduktas la premiitajn verkojn en „Esperanto“ aŭ alia revuo de UEA. Ĉiu premiito ricevas diplomon.

Unua premio 280 gld.; dua premio 196 gld.; tria premio 112 gld.; Premio Luigi Minnaja ĉirkaŭ 300 gld.; Premio „Nova Talento“ (por la plej bona konkursanto neniam antaŭe premiita) 196 gld. plus enskribo sur la pokalo Henry Harabagiu. Por Infanlibro de la Jaro 588 gld., Por kanto 280 gld. Pacpremio 280 gld.

(El revuo „Esperanto“ 11/1985)



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 55
FEBRUARO
2 • 1986

NIA ASOCIO ANTAŬ LA XIII KONGRESO DE BKP

Inĝ. Petăr TODOROV,
vicprezidanto de BEA

La antaŭstaranta XIII kongreso de Bulgara Komunista Partio (BKP), la 30-jara datreveno de la historia Aprila Plenkunsido kaj la unua datreveno de la Februara Plenkunsido de CK de BKP estas inda kaŭzo por seriozaj preparoj kaj meditoj!

La raportnoto de la Generala Sekretario de CK de BKP Todor Jivkov pri la stilo kaj metodoj de laboro, pri plua perfektigo de la Leninaj aprilaj principoj de gvidado, estigas motivo por pli granda atento al la menciitaj demandoj, por enkonduko en ĉiun aferon de multe pli aktiva kaj krea stilo. La scienc-teknika revolucio starigas nin antaŭ novaj intelektaj mondoj, antaŭ vastegaj horizontoj de la movado de novigantoj kaj inventantoj. Ne eblas fari scienc-teknikan revolucion sen koncerna revolucio en la konscio kaj agmaniero de la aparta homo, kolektivo kaj nacio. Seriozan reva-lorigon kaj pozitivajn ŝanĝojn bezonas la spirita sfero. Krome, utila por ni estas la pozitiva eksterlanda sperto.

Baza kriterio de pritakso estas la rezultoj, kvalito kaj efekto de la laboro. La 41-a Nacia Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio donis ĝustan direkton por evoluo de la Asocio kaj ni povas deklari, ke ĝi raportis pri plia organiza stabiligo de la bulgara esperantistaro. Ĉefan rolon tiudirekte ludos la preciza planado, kiu garantios sukceson al la kompleta kaj varia asocia agado. Sendepende de la konstateblaj paŝoj antaŭen, oni devas fari ĉion necesan por ne permesi ripetigon de malnovaj, ne venkitaj malperfektaĵoj kaj neglektadon de vivgravaj taskoj kiel la preparado kaj perfektigado de instruistoj, prilaboro de instrudokumentaro kaj de instru-teknikaj rimedoj kaj metodoj, de la problemoj pri programa organizado kaj scienca reorganizo en la instruado, de plibonigo de la materiala bazo por instruado k. a.

La akumulita granda sperto en la gvidado de instruistaj kursoj kaj de kursoj por perfektigo, inkluzive la utiligan kunlaboron inter BEA kaj

la Ministerio de Popola Klerigo kaj la Centra Instituto por Perfektigo de Gvidkadroj (CIURK) helpas al ni realigi la starigitajn antaŭ ni novajn historiajn taskojn. La eksperimento en Oka Meza Politeknika Lernejo — Sofio, pruvas tion kaj kontribuas por eltrovo de novaj rimedoj kaj eblecoj.

Por atingi la deziratan stabilecon ĉe planado de nia agado kaj rezulte — ankaŭ de ĝia gvidado, estas necesa speciala atento al la informa sistemo. La ĵus finiĝinta fine de la pasinta jaro scienca sociologia esploro de la membraro de Bulgara Esperantista Asocio konkludas pri la neceso speciale zorgi pri aktiva, ĝustatempa direkta kaj perioda informado! La sukcesan solvado de tiuj taskoj fare de BEA garantias la jam funkcianta ĉe la Centra Estraro propra komputera ekipaĵo, la formitaj eldonaj skipoj el spertaj redaktoroj kaj aliaj specialistoj kaj la pli grandaj financaj eblecoj. La Buroo de CE de BEA jam decidis, ke la informado havu direkton ankaŭ al la vasta neesperantista publiko, per kio estos likvidita entute la deŝiriteco de la Esperanto-movado de la kompleta bulgara socio.

Al la mastruma politiko de Ekonomia Entrepreno „Globo“ enkadre de BEA estas ŝuldataj la kreskintaj financaj ebloj de la Asocio. Ĝi estiĝis reala formo kaj bazo por plua evoluo de BEA kaj de la Esperanto-movado en la lando. Dank' al la bonaj financaj rezultoj ni per propraj fortoj plibonigos la libroeldonadon (kvante kaj kvalite), la realigon de novaj lernoprogramoj, la pliriĉigon de la klubeja materiala fonduso de la Asocio, la informan kaj varban aktivadon en la lando kaj eksterlande.

La granda privilegio rekrei, reformi apartenas al la junularo, al ĝiaj aŭdaco, serĉemo kaj energio. CE de BEA konscias tion kaj pro tio observas kaj aktive apogas la diversajn aranĝojn kaj iniciatojn de la Junulara Sekcio — brigadana movado, revuoj de Esperanto-Parolo kaj Kanto,

renkontiĝoj, seminarioj pri starigode aktiva vivopozicio, en kiu ĉefan rolon ludos la kontaktoj kaj kunlaborado kun la Komsomolo.

La specifaj eblecoj de Esperanto malfermas aparte bonajn perspektivojn por ĝia utiligo ĉe la solvado de diversaj problemoj de la scienc-teknika revolucio kaj informado. La establita post la 41-a kongreso de BEA Sekcia Konsilio, kiu ĝeneraliĝos kaj gvidos la aktivadon de la esperantistaj sekcioj — poŝtista, fervojista, medicina, ekologia, instruista, filatelista k. a., estonte montros pozitivajn rezultojn, sekvante kaj aplikante la linion de la Partio kaj de la Popola Registaro pri

senhalta progreso. Gravus por la momento, ke ni ne strebu al maksimumaj rezultoj, sed precize, altkvalite kaj ĝustatempe ni plenumu la starigitajn taskojn kaj la ellaboritajn programojn. La hodiaŭa rezulto estu pli bona ol la hieraŭa kaj la komparado de nia antaŭeniro estu kun la avantgarduloj, kun la unuaj!

Ĉiu esperantisto devas serioze plibonigi sian profesion kvalifikon, plialtigi sian politikan konscienccon, plivastigi sian kulturon, strebi al pli alta kvalito en la laboro kaj al obo de la socialisma moralo en sia vivo, kio plej ĝuste konformas al la postuloj de revolucia pensado kaj aktivado!

KOMPUTILOJ KAJ INSTRUADO DE ESPERANTO

Dum la lastaj jaroj la familio de komputeroj pliriĉiĝis per ankoraŭ unu reprezentanto — la persona komputilo. Se la ceteraj maŝinoj eniris la praktikon pli nerimarkite, la persona komputilo jam de la komenco de ĝia aplikado altiris la intereson tiel de specialistoj, kiel ankaŭ de la ordinaraĵoj homoj. Hodiaŭ preskaŭ ne ekzistas ĵurnalo, revuo aŭ televida programo, en kiu la temo pri komputiloj ne estas traktata: oni laŭdas iliajn grandajn eblecojn, prognozas ilian ampleksan aplikadon en la ĉiutaga vivo.

Cu tiu ĉi granda intereso al la komputiloj estas hazarda? Cu ĝi baziĝas sur realaj faktoj aŭ ĝi estas nur laŭmoda enloĝigo?

Kio distingas la komputilojn de ĉiuj ceteraj maŝinoj? Estas du plej gravaj specifaĵoj: ili posedas memoron kaj eblecon prognozi la funkcion. Dank'al tio la komputilo estas „intelekt“a maŝino, kies funkciadon difinas antaŭ ĉio la aplikata programo. Ĉar la homo povas krei plej diversajn programojn, tio ebligas la universalan aplikadon de la komputilo.

La problemoj pri aplikado de komputiloj en la instruado de Esperanto estas ligita kun la problemoj pri ties aplikado al la sistemo de klerigado ĝenerale.

La komputilo disponigas pli ampleksan informon. Principe ĉiun informon la komputilo kapablas reprodukti tiomfoje, kiom necese. La komputilo ne eraras — kion ĝi „scias“, tion ĝi ne forgesas. En ĝin oni povas enigi diversspecajn informojn, kiuj multfoje superas la eblecojn de unuopa instruisto.

Pere de komputilo oni povas raciigi konsiderinde la pedagogian laboron, malpliigi la elspezojn por instrua tempo, garantii tre bonajn rezultojn de la instruado.

Aplikado de komputilo al la instruproceso ebligas raciigi ankaŭ la laboron de la lernantoj. Pere de komputilo kreiĝas kondiĉoj, kiuj plialtigas la aktivecon de la lernantoj.

Per la helpo de komputiloj oni povas ekzameni kaj analizi la pedagogian procezon kaj fenomenojn surbaze de kolektitaj statistikaj informoj.

La personajn komputilojn oni povas uzi por plenumi diversajn funkciojn en la studprocezo: informan, modlantan, ekzercantan, kontrolantan kaj aliajn.

La ĉiam pli vasta uzado de personaj komputiloj en la studprocezo sur ĉiuj niveloj de la kleriga sistemo en Bulgario kaj en eksterlando montras la grandan rolon, kiun ili ludos en la lernado de preskaŭ ĉiuj studobjektoj, inkluzive instruadon de fremdaj lingvoj.

Same la instruado de Esperanto helpe de personaj komputiloj malkovras grandajn eblecojn por ĝia rapida alproprigado kaj disvastigado en diversaj sferoj de la homa vivo. Ni montros nur kelkajn faktojn kaj lingvajn specifaĵojn de Esperanto, kiuj apogas la ideon pri kreo de sistemo pri programita instruado de la lingvo pere de komputiloj:

— ĝenerala aplikado de personaj komputiloj en diversaj lernejoj (en Bulgario ĝis la jaro 1990 ili estos 30 000 laŭ la plano de la Ministerio de Popola Klerigo) signifas, ke ĝustatempe kreo de programoj por instruado de Esperanto per komputiloj, kiujn oni povas facile kaj rapide plimultiigi, garantias ĝian parolan ekposedon fare de la lernantoj kaj de specialistoj, kiuj uzas komputerteknikon. Pro la alta efektiveco de la dialogo „homo-komputilo“ kaj de la facileco de la lingvo mem, tiu ĉi metodiko havas bonan estontecon;

— simpleco, logikeco kaj manko de esceptoj en la gramatiko de Esperanto ebligas kreon de plena strukturo por memstara (aŭ en komputila klaso) lernado, aplikante gramatikajn strukturojn, kiuj posedas multiplikantan efektion.

— la kreado de programoj por ekposedo de leksika minimumo de Esperanto povas efektiviĝi per uzado de naciaj lingvoj. Tiamaniere,

per malgrandaj suplementaj programoj la bazan kurson oni povas adapti al ĉiu dezirata lingvo. Tio faciligas la disvastigadon en la tuta mondo de la baza kurso kiel preta ellaborita programprodukto.

En Bulgario jam en multaj mezgradaj kaj superaj lernejoj oni strebas krei kaj eksperimenti programojn por instruado de fremdaj lingvoj uzante personajn komputilojn.

Ce katedro „Pedagogio kaj novaj metodoj de instruado“ en la Supera Maŝin-Elektroteknika Instituto en Sofio jam estas prilaborita metodiko por fremdlingva instruado pere de personaj komputiloj. Rezulte de efektivigitaj kontaktoj kun Bulgara Esperantista Asocio, specialistoj ĉe la katedro eksperimentas iujn ideojn kaj planas en proksima estonteco prilabori komplete sistemon pri lernado de Esperanto pere de personaj komputiloj kaj aplikante la plej aktualajn metodikon kaj teorion de la pedagogia sistemo.

Traktante la problemon pri aplikado de la

komputiloj al instruado (aparte de Esperanto) estas necese preventi ekstremajn opiniojn kaj decidojn.

Oni ne troigu la eblecojn de komputiloj speciale por instrukceloj — kio povus kaŭzi subtaksadon de la rolo de instruisto.

La komputilo ne estas kaj ne povas esti antaŭiganto de la instruisto. La aplikado de komputiloj al la studproceso tute ne signifas rezignon pri uzado de lernolibroj, studhelpa literaturo kaj aliaj klasikaj kaj pli novaj instruhelpiloj.

Necese estas akcenti sur la homan faktoron t.e. instruistoj, metodikistoj, pedagogoj k. a., kiuj difinas la edukajn celojn kaj enhavon de la studprogramoj kaj bone konas la eblecojn de la lernantoj. Tamen se la instruisto ne kapablas organizi normalan studprocezon uzante klasikajn rimedojn kaj metodikojn, ne estas dece multipliki liajn didaktajn malperfektaĵojn helpe de tiel malsimpla kaj multekosta maŝino, kia estas la komputilo.

Ing. Ivan PACOV

Riĉa eldonagado — valoraj kaj interesaj libroj

Unu el la fundamentaj taskoj de BEA estas konstante plibonigi la ideologian agadon de siaj membroj, sekvante la principojn de la Aprila politiko de Bulgara Komunista Partio. Tiun ĉi gravan taskon oni povas realigi ne nur pere de la vasta organiza laboro, sed ankaŭ per plialtigo de la kultura nivelo de la membroj. Tial BEA aparte zorgas pri siaj eldonoj. Antaŭ ĉio la Asocio strebas eldoni sufiĉajn Esperanto-lernolibrojn, kiuj estas bezonataj por la komencantoj kaj progresintoj en nia lingvo. Pere de la bonkvalitaj lernolibroj, verkitaj de kompetentaj aŭtoroj, BEA helpas al la multnombraj adeptoj de la Internacia Lingvo ekposedi ĝin kaj perfektigi sian lingvan nivelon. Sed ne sufiĉas nur paroli kaj konversacii en nia lingvo: la Esperanto-movado estas antaŭ ĉio kultura movado kaj ĝiaj membroj devas bone koni ĝian kulturen historion kaj longjarajn tradiciojn, la batalojn kaj suferojn de la bulgaraj esperantistoj, kiuj malgraŭ la persekutoj far la faŝistoj, heroe portis la torĉon de la Internacia Lingvo.

Dum preskaŭ unu jarcento en Esperanto estis kreita riĉa literaturo, kiu respegulas la plej noblajn celojn kaj ideojn de la Internacia Lingvo. Por respondi al la kulturaj bezonoj de siaj membroj, BEA aprobis riĉan eldonplanon por la kuranta 1986, kiu enhavas interesajn kaj valorajn librojn.

En la ĉi-jara eldonplano prioritaton denove havas la lernolibroj, vortaroj kaj lerno-

helpiloj — kiel ekzemplon ni mencias „Lernohelpilo por progresintoj“ de Violin Oljanov. Ankaŭ tiuj, kiuj nun komencas lerni la Internacian Lingvon, bezonas bonajn lernolibrojn kaj variajn, interesajn legolibrojn. Por ili zorgis Koljo Panĉev, kiu kompilis „Gaja legolibro por komencantoj“. Ĝi enhavas konatajn anekdotojn pri Ruza Petro kaj Nastradin Haĝo. Tiuj ĉi anekdotoj certigos ne nur gajaĵn minutojn, sed ili helpas la lernantojn nermarkeble ekoni la specifon de nia lingvo.

Ĉiuj, kiuj komencas lerni Esperanton, samtempe komencas ankaŭ korespondi kun eksterlandaj samideanoj. Pri la bona kaj sistema organizo de nia Esperanto-korespondado valorajn konsilojn donas Nikola Aleksiev per sia libro „Kiel ni gvidu nian korespondadon kun eksterlandanoj“. La libro enhavas ne nur konsilojn, sed ankaŭ originalajn ideojn, ekzemple kiel niaj leteroj estu pli interesaj kaj variaj, pli riĉaj je temoj kaj informoj.

Okaze de la ĉi-jara Revuo de Esperanta Parolo kaj Kanto kaj helpe al la partoprenantoj en ĝi, BEA eldonos la poemaron „Homoj, antaŭen!“, kiu enhavas elektitajn poemojn de la neforgesebla poeto, de la talenta bardo de Dimitrovgrad — Penjo Penev. La majstre tradukitaj poemoj vekos la intereson ne nur de la junaj partoprenantoj en la Revuo, sed ankaŭ de ĉiuj esperantistoj, kiuj ŝatas poezion.

La riĉa eldonagado de BEA donas eblecon por pristudo kaj esploro de la kultura histo-

rio de nia Asocio. Unu el la interesaj kulturaj fenomenoj de la Bulgara Esperanto-movado estas la Bulgara Esperanto-Teatro, kiu ekzistas jam dudek kvin jarojn. Ĝiaj sukcesoj sur la internacia scenejo estas sennombraj kaj okaze de ĝia 25-jara jubileo la geaktoroj Belka Beleva kaj Anani Anev verkas la libron „Dudek kvin jarojn sur Esperanta scenejo“. En ĝi ili priskribos la historion de la Bulgara Esperanto-Teatro kaj rakontos siajn riĉajn neforgeseblajn travivaĵojn sur Esperanta scenejo.

Multaj esperantistoj, bulgaraj kaj eksterlandaj, interesigas pri la vivmaniero, socia agado, ĉiutagaj problemoj de la bulgaraj virinoj. Por kontentigi tiun ĉi intereson Nikola Aleksiev tradukis la libron „Cent demandoj kun respondoj pri la bulgara virino“. La libro enhavas historiajn informojn pri la fondiĝo de la virina movado en Bulgario, pri ĝia vasta socia agado, pri ĝia senlaca batalo.

Ĉi-jare aperos ankaŭ la libro de Donĉo Ĥitrov „En la mirinda mondo de la kino. Esperanta kino-foto terminaro“. Ĝi estas unika, ĉar

en Esperanto ankoraŭ ne ekzistas verko, kiu el profesia vidpunkto pritraktas la problemojn de la plej juna kaj populara arto — la kino. Tiu ĉi libro estas rezulto de la fruktodona kunlaboro inter Hungara Esperanto-Asocio kaj Bulgara Esperantista Asocio.

Certe grandan intereson vekos la libro de Canko Murgin „Esperanto-Poetoj de Bulgario“. La verko estas la unua literatura analizo pri la plej elstaraj bulgaraj Esperantaj poetoj.

En konciza artikolo ne eblas mencii ĉiujn titolojn, kiujn eldonos BEA dum 1986, sed ni esperas, ke la aktiva eldonagado donos eblecon al ĉiu esperantisto elekti por si mem tiujn ĉi librojn, kiuj plej forte tiklas lian intereson kaj scivolon.

Ni esperas, ke dum tiu ĉi jaro niaj libroj, dank' al la novaj teknikaj eblecoj de presado, estos ne nur riĉenhavaj, sed ankaŭ bonkvalitaj kaj belaspektaj. Ni tutkore deziras al ĉiuj agrablajn legohorojn.

Georgi MIĤALKOV,
respondeca redaktoro ĉe BEA

LA DONACEMO — BELA POPOLA TRADICIO

La donacemo — tiu bela malnova popoltradicio, ne estas fremda ankaŭ al la membroj de E-societo „Vekiĝo“ en Sumen. Tiel en la pasinteco, kiel ankaŭ nun multaj el ili donacis al sia societo malnovajn dokumentojn, librojn, fotojn, monon. . .

Jen kelkaj ekzemploj: Atanas Bojaĝiev, veterano de nia movado, honora prezidanto de societo „Vekiĝo“ kaj elstara sociaganto en Sumen, okaze de sia 70-jariĝo donacis al la societo 100 levojn.

Ivan Jankov, la plej maljuna esperantisto en Sumen (jam forpasinta), en la solenaĵo lige kun lia 80-jariĝo transdonis al la societa prezidanto koverton kun 50 levo.

Tre valora estas la donaco de Ksenofon Jankov — unu el la unuaj bulgaraj esperantistoj, kunfondinto de societo „Vekiĝo“ kaj ĝia multjara sekretario. Li transdonis al la societo la originalan manuskripton de himno de societo „Vekiĝo“ verkita de li, kies muzikon komponis la eminenta muzikfakulo el Sumen Atanas Zidarov. Dank' al tiu donaco oni devne ekkantis la himnon.

La malnova sindona esperantisto Kiril Bogutinski testamentis al la esperantistoj el

Sumen kronikon de societo „Vekiĝo“, kiun li dum pluraj jaroj skribis kaj ankaŭ ĉiujn siajn E-librojn kaj gazetojn.

Librojn transdonis al ni ankaŭ la parencoj de la jam forpasintaj Boris Furnaĝiev, Ilija Todorov kaj Rajna Konjarska.

Originalajn fotojn kaj dokumentojn donacis la parencoj de Ilija Silvestriev — fondinto de la societo, de la kontraŭfaŝistoj Ljuben Kaŝĉiev kaj Atanas Lakov (kiu membris en la societo dum la periodo 1937—1943), Ĥrislo Angelov, Petâr Colov, Atanas Bojaĝiev, la veteranoj Dimitâr Zagorski, Marin Antonov, Dimitâr Penĉev. Rememorojn pri sia E-agado kiel membroj de „Vekiĝo“ jam transdonis la elstara batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo docento Belĉo Nikolov. La honora membro de „Vekiĝo“, la E-verkistino Rajna Konstantinova, dediĉis multajn el siaj verkoj al Sumen kaj al la ŝumenaj esperantistoj, donacis librojn kun sia aŭtografaj.

Amikoj-esperantistoj, ni daŭrigu la bonan tradicion, kontribuante por konservo de ĉio valora kaj utila por nia E-movado!

Cvjatko TODOROV, prezidanto de
societo „Vekiĝo“, Sumen

ALTAJ DISTINGOJ POR DONĈO ĤITROV

La Stata Soveto de Popola Respubliko Bulgario distingis per ordeno „Kiril i Metodij“ — I grado, DONĈO ĤITROV, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, pro lia multjara aktiva kaj respondeca ĵurnalista agado kaj lige kun

lia 60-jara jubileo.

La Estraro de la Unuiĝo de Bulgaraj Ĵurnalistoj distingis Donĉo Ĥitrov per sia honora insigno „Ora Plumo“ pro lia multjara ĵurnalista aktivado.



Krâstju Karucin — vivanta enciklopedio de BEA

Pri Krâstju Dimitrov Petkov (Karucin) oni povas diri multajn bonajn vortojn — esprimo de dankemo kaj estimo al la civitano, komunisto, kreanto kaj esperantisto.

Lia kreoentuziasmo estas infekta, lia sciama — nesatigebla. Li estas modelo de toleremo kaj estimo al la aliuloj. Li vivas kaj kreas, posedata de helaj sentoj kaj ideoj.

Krâstju Karucin estas modelo de produktiva laboremo, li bone utiligas ĉiun minuton de sia tempo. Li estas la vivanta enciklopedio de BEA, ĉiam preta doni la necesan informon — detalojn pri evento, persono, dato, diri laŭokaze bonan vorton, konsili, pruntedoni libron, helpi, se necese.

Li estas zorgema kaj feliĉa edzo, patro kaj avo.

Kiel organizanto, kiel komunisto li sincere bedaŭras pro allasitaj malperfektaĵoj, mem serĉas kaj montras la vojon por ties forigo, ĉiam malkaŝe kaj principe esprimas sian opinion.

Interesa kaj riĉa estas la vivo de nia jubileulo, elkreskinta en familio kun modestaj materialaj ebloj, inter laboremaj kaj inteligentaj gefratoj, frue aliĝintaj al la bataloj de la bulgara proletaro. De ilia imitinda ekzemplo lernas la juna Krâstju Karucin. Ni ne forgesu ankaŭ la epokon, kiu abundas je gravaj por la popolo eventoj. Naskita en vilaĝo Pădarevo, distrikto de Sliven, la 22. 02. 1915, li viriĝas en urbo Stara Zagora. Deksesjara junulo li jam membras en marksismaj kaj literaturaj rondoj, en turistaj kaj abstinenculaj societoj, gvidas junularajn klerigajn grupojn, estas prezidanto de redakcia kolegaro de lernejana literatura revuo; li partoprenas en laboristaj kunvenoj, en stratedemonstracioj — ĉiam entuziasmoplena, ĉiam sur fruntpozicio. Nature, li baldaŭ altiras la atenton de la reaktiaj faŝistaj regantoj. Viciĝas minacoj fare

de la polico, arestoj. Perfekta lernanto, li tamen estas eksigita el la gimnazio. Kiam la gimnazia direktoro postulas de li deklaron pri ĉesigo de lia „ribela“ agado, la junulo senhezite akceptas la postsekvojn de sia malobeema konduto. Kaj li plene fordonas sin al laboro en la eksterleĝa junulara komunista unuiĝo, estiĝas sekretario de konspira grupo kaj kunlaboranto de la Distrikta Komitato de la legala Laborista Junulara Unuiĝo.

En 1934, ankoraŭ ne plenaĝa, li estas kondamnita de la faŝista registaro al 12 jaroj kaj duono da malliberigo. En la malliberejo li pasigas 5 jarojn. Tamen, fidela al siaj komunistaj ideoj kaj al sia energia karaktero, Karucin ne senesperigas, male, li utiligas la tempon en la malliberejo por plivastigi siajn konojn pri marksismo-leninismo, politika ekonomio, historio, literaturo, arto, fremdaj lingvoj. El la malliberejo li eliras ankoraŭ pli forta kaj konvinkita malamiko de la faŝista registaro. Tuj li estiĝas membro de la nelegala Laborista Junulara Unuiĝo, aktive kunlaboras al la progresema gazetaro. Baldaŭ li denove estas arestita kaj pasigas unu teruran jaron en la koncentrejo Enikjoj (en Greklando), kie li apenaŭ ne perdas sian vivon. Post la liberigo el la koncentrejo, somere de 1944, li jam estiĝas membro de la Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio (BKP).

La liberigo de la lando el la jugo de faŝismo kaj kapitalismo permesis al Karucin plene realigi sin kiel redaktoro de la distrikta gazeto en Stara Zagora, kiel ĉefo de fako en gazeto „Rabotniĉesko Delo“, kiel redaktoro de la Eldonejo de BKP kaj kiel kunlaboranto en la Centra Partia Arkivo. Liaj artikoloj pri la vivo kaj la faro de grandaj bulgaroj kaj de grandaj personecoj de monda signifo estas vera kontribuo al la biografia ĝenro. Kr. Karucin estas kompilinto de multaj kolektoj kaj albumoj: „Biografio de la amikeco“, verkoj de Dimităr Blagoev en 20 volumoj. Li estas aŭtoro de la ekspozicioj de politikaj, literaturaj kaj aliaj materialoj „60 jarojn BKP“ kaj „25 jarojn „Rabotniĉesko Delo“, alte aprezitaj de la publiko.

Pro sia riĉa kaj utila socia agado (membro de Regiona Komitato de BKP en Sofio, sekretario de Politika Fakoj ĉe la redakcio de „Rabotniĉesko Delo“, prezidanto de la Sindikata Grupo

ĉe la Eldonejo de BKP, lektoro-propagandisto, Krâstju Karucin estas distingita per altaj ŝtataj medaloj kaj ordenoj.

Sed la granda amo de Krâstju Karucin estas Esperanto, kun kiu li ligas por ĉiam sian maltrankvilan sorton. Pro gvidado de kurso „de la komunista lingvo Esperanto“ (citaĵo el ordono!), li devas forlasi la gimnazion, kaj pro lia plua aktiva esperanta agado estas konstante persekutata de la faŝista registaro.

Liaj instruistoj de Esperanto estas Asen Grigorov kaj la instruistino el Stara Zagora Irina Ĉukova. La inteligenta junulo ekamas la lingvon kaj ĝiajn humanajn ideojn. Baldaŭ li komencas vastan korespondadon kun laboristoj el multaj landoj, ricevas riĉajn informojn kaj mem skribas pri la bataloj de la bulgara proletaro; li popularigas la veron pri la lando konstruanta socialismon — USSR. La modela E-sekcio en Stara Zagora, kies sekretario li estas, estiĝas centro de klaskonsciaj laboristoj kaj intelektuloj. Gazeto „Internacia Laborista-Kampana Korespondanto“, kies kunlaboranto estas ankaŭ Karucin, estas la plej disvastigita organo de la laborista E-gazetaro. La E-movado en Bulgario povas fieri pri la internacia korespondado de Karucin — laŭ kvanto, kaj precipe laŭ ties enhavo. Mi mencias nur jenan fakton — pro letero de k-do Karucin, en urbo Seclin-Nord, Francio, 28 000 ministoj organizas mitingon defende al la 32 mortkondamnitaj maristoj el Varno.

En la malliberejoj de Stara Zagora, Pleven, Sliven pli ol 200 politikaj malliberuloj lernas Esperanton sub la gvidado de Karucin. En la malliberejoj li konatigas kun siaj kunbatalantoj — la esperantistoj-kontraŭfaŝistoj — Nikola Aleksiev, Hristo Gorov, Nano Nanov, Georgi Kavlaĥov, Genko Gjulev ka. La amikeco kun ili favore influas lian idean evoluon.

Gravaj estas ankaŭ la sukcesoj de Karucin kiel organizanto — li restarigas la agadon de E-societo „Verda Stelo“ en Stara Zagora, kiu estas kruele vundita de la faŝistoj, kaj kiel multjara membro de la Buroo de BEA kaj ties organiza sekretario, li kontribuas por ĝia stabiligo kaj por plialtigo de ĝia aŭtoritato antaŭ la publika opinio. Kr. Karucin fordonas multe da fortoj kaj tempo por organiza realigo de la plej signifaj E-eventoj en nia lando: naciaj kongresoj kaj konferencoj, universalaj Esperanto-kongresoj en Bulgario. Ankaŭ la Bulgara Esperantista Kooperativo multon ŝuldas al Kr. Karucin — pro ĝia popularigo inter la bulgaraj esperantistoj. Signifa estas ankaŭ lia kontribuo por esplorado de la historio de la Bulgara E-movado, al la bibliografio de E-eldonoj, por popularigo de E-libroj.

Baldaŭ Kr. Karucin ĝojigos nin per novaj rezultoj de sia senlaca laborado.

Estu viva kaj sana, kara k-do Karucin!

Elkorajn gratulojn lige kun via 70-jariĝo!

Stefka ĈENKOVA

Ne ĉesas la leteroj...

(Dank'al la rubriko „Deziras korespondi“)

„Mi vivas kun la penso, ke estus bone, se pli da homoj — junaj kaj maljunaj — lernus Esperanton, korespondus por konvinkigi pri la magia forto de la Internacia Lingvo, kreita de d-ro Zamenhof por fratiĝo de ĉiuj homoj sur la tero. Por ke ili povu rakonti unu al la alia per vortoj, fotoj kaj ilustritaj poŝtkartoj pri la belaĵoj de nia planedo, ĉar nur la belaj kaj bonaj aĵoj gojigas la homan animon...“

Tia estas la opinio pri Esperanto de la 64-jara esperantistino el Varna Ivanka Koleva. Jam kiel 16-jara laboristino en teksfabriko ŝi konatigas kun esperantistoj kaj komencas lerni la Internacian Lingvon. Post sia pensiĝo ŝi decidas plibonigi sian lingvan nivelon.

Dum ŝia filo soldatservas kaj Ivanka Koleva restas sola, ŝi dediĉas al Esperanto multe de sia libera tempo. Iun tagon, en 1981, legante la rubrikon „Deziras korespondi“ en „Bulgara Esperantisto“, ŝi vidas la adreson de ĝelernantoj-komencantoj el urbo Ĉeljabinsk, USSR. Ivanka sendas leteron al la sovetaj junuloj kaj bondeziras al ili sukceson en la lernado de Esperanto. Granda estas ŝia ĝojo, kiam ŝi ricevas respondon de la 15-jara Sergej Saŝmin. La junulo proponas al ŝi korespondadon kaj deziras per leteroj konatigi ŝin kun sia avino, kiu ankaŭ estas vidvino. La esperantistino el Varna iom post iom estiĝas por Sergej la plej interesa homo el liaj alilandaj korespondantoj. Ili interŝanĝas informojn pri siaj urboj kaj landoj, pri siaj ŝatokupoj.

En letero al la redakcio, dankante pro la amikeco akirita pere de „Bulgara Esperantisto“, Ivanka Koleva skribas: „Nun mi pli malofte korespondas kun Sergej, ĉar li estas soldato. Sed mi portas en mia koro kaj penso tiun junan homon. Li kontaktigis min kun sia avino Lidia Saŝmina, pro kio mi estas tre danka al li. Niaj leteroj ne ĉesas. Ni konas niajn familiojn, amikojn, eĉ la najbarojn. Nun kun Linjo kaj Serĉjo ni priparolas gastadon. Ĉiu nova letero plenigas mian animon per neesprimebla ĝojo kaj fiereco.“

Mi ofte havas gastojn — al mi gastis amikoj el Varsovio, instruisto el Bagdado, esperantistoj el GDR, Hungario, USSR... Mi korespondas kun pli ol tridek esperantistoj el Sovet-Unio kaj kun ankoraŭ tiom el multaj aliaj landoj: Nederlando, Nov-Zelando, Italio, Francio, Britio, Jugoslavio, GDR, Pollando, Aŭstrio, Kolumbio, Brazilo, Svedio, Irlando, Ĉeĥoslovakio, Aŭstralio, Rumanio, Afriko...

La korespondado de Ivanka Koleva estas pruvo, ke la vojoj de amikeco inter la homoj estas sennombraj kaj parto de ili komenciĝas per la Internacia Lingvo.

Maria JANKOVA



Kongresa Komunikilo

71-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO (Pekino, 26. VII.—2. VIII. 1986)

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam; LKK: p/a Ĉina Esperanto-Ligo, PK 825, Beijing

LOKA KONGRESA KOMITATO. La LKK konsistas el eminentaj agantoj de la socia kaj esperantista vivo de Ĉinio: ĝia prezidanto Ye Laishi (Jezezo) estas konsilisto de la Ŝtata Komisiono de Reformado de Skriba Sistemo. El la vicprezidantoj Chen Yuan estas vicministro de la sama komisiono kaj Zhang Qicheng ĝenerala sekretario de ĈEL. Ĝenerala sekretario estas Zeng Heyao kaj sekretario Dai Songen. La ceteron konsistigas Zhu Mingyi (kasisto), Zhang Haiping (kongresejo), Gong Peikang (ekskursoj), Li Yuping (artaj aranĝoj), Nan Youli (loĝado), Zou Guoxiang (kulturaj aranĝoj), Xu Senrong (dokumentoj, ĝiĉetoj), Jiang Hongzhang (junularaj aranĝoj), Jiang Jun (gazetara servo), Tan Xiuzhu (eksterlanda informado) kaj Zhang Zai (libroservo).

INTERKOMPREENIĜO, paco, evoluo. Por akordigi la enhavon de la kongresaj laboroj kun la proklamo de UN de la jaro 1986 Internacia Jaro de Paco, la Estraro de UEA elektis kiel temon de la kongreso „interkompreniĝo, paco, evoluo“.

KONGRESA UNIVERSITATO. La 39-a sesio de Internacia Kongresa Universitato okazos en la kadro de la 71-a UK, la rektoro estas prof. Ye Junjian, elstara verkisto, en la Esperanto-Komunumo konata kiel la originala verkisto Cicio Mar. — Universitataj profesoroj kaj simile kvalifikitaj personoj estas invitatataj proponi

prelegon antaŭ la 20-a de januaro 1986 al prof. B. Sherwood, Dept. of Physics, Carnegie-Mellon Univ. Pittsburgh, PA 15213 Usono. Al tiu adreso oni sendu fotoportreton kaj kvar kopiojn de titolo, resumo, bibliografio kaj biografieto. Prelegantoj ricevos danksumon, sed ne la vojaĝkostojn.

SPECIALA POŝTMARKO. La Ĉina Poŝto intencas emisii speciala(j)n poŝtmarko(j)n kaj stampo(j)n. Tamen definitive decidado ĉi-rilate ankoraŭ ne estas faritaj.

INTERESIĜO EN LA TRIA MONDO. La kongresa administracio ricevis multajn helpopetojn de junaj triamondanoj, kiuj deziras partopreni la UK. Por povi eĉ nur iomete respondi al tiuj petoj kaj sekve pli tutmondigi la Kongreson, UEA kalkulas pri solidareco de la esperantistoj en pli riĉaj landoj kaj alvokas pri donacoj al la adopta Kaso de la UK.

LOĜADO EN PEKINO. LKK jam delonge rezervis grandan nombron da ĉambroj en pluraj hoteloj, unuavice proksime al la kongresejo. En Ĉinio ne eblas apartigi la loĝadon disde manĝoj, urba transporto kaj enurbaj ekskursoj. Tial bona hotelo en Pekino kostas ĉ. 160 gld. tage (en 2-lita ĉambro, kun du manĝoj, transporto kaj ekskursoj). La samo en luksa hotelo — inter 240 kaj 270 gld. LKK klopodas certigi kelkcenton da litoj en studentaj domoj.

VOJAĜOJ. Pro la supra kialo, UEA ĝis nun ne povis ankaŭ definitive fiksi la detalojn pri la planataj grupvojaĝoj. Ĉiukaze, la plej malmultekosta flugo kostos iom pli ol 2000 gld., sed oni volas ekskursi kaj resti pli longe, necesas kalkuli pri kelkaj pliaj miloj da guldenoj. Plej verŝajne jam post kelkaj semajnoj oni scios ĉiujn detalojn.

(El „Heroldo de Esperanto“ — n-ro 15/1985)

KION BEZONAS LA SCIENCISTOJ — LA LINGVON ESPERANTO AŬ LA KODON INTERNACIA LINGVO?

„La Internacia Lingvo al la sciencistoj, la tuta n Esperanto al la Esperantistoj!“ Per tiu retorikaĵo d-ro Helmar G. Frank resumis la asertojn, kiujn li faris pri la nomo de la planlingvo de d-ro Zamenhof, en sia inaŭgura parolado ĉe la Akademio Internacia de Sciencoj (AIS) en Sanmarino en decembro 1983. D-ro Frank argumentis, ke sciencistoj bezonas nur novan kodon por interkompreniĝo; kiel sciencistoj ili ne bezonas la kulturajn valorojn kaj la historian tradicion de Esperanto. Nu, Frank menciis nur sciencistojn, sed en la pasinteco kaj ankaŭ hodiaŭ en certaj sociopolitikaj medioj regas la nocio, ke por ĉiuj Esperanto devas esti nur ilo, speco de komunika rimedo kiel la telefono aŭ radio.

Ankaŭ en la tempo de Zamenhof estis homoj, kiuj elbuŝigis la saman rekantaĵon:

Oni bezonas nur la lingvon,
For la mucidan tradicion!

La aŭtoro de Esperanto respondis al tiu sinteno en inaŭgura parolado multe pli leginda kaj legenda ol tiu de d-ro Frank en Sanmarino. La jaro estis 1906, la loko Genevo, kie okazis la Dua Universala Kongreso de Esperanto. Tiel grava estis la demando pri la signifo de la esperantismo tiutempe, ke Zamenhof detale pritraktis tiun temon en sia prelego. Difinante la esperantistojn, Zamenhof priskribis du polusajn tipojn: tiuj, kiuj, akceptinte la internan ideon, „revas unuigi

per Esperanto la homaron“ kaj ankaŭ tiuj, kiuj „uzas Esperanton ekskluzive por celoj praktikaj“. Li deklaris plue, ke la idealisma flanko de la esperantismo ne estas deviga. Ĝis tiu punkto ne estas konflikto inter Zamenhof kaj Frank, ĉar ankaŭ tiu ĉi kaj liaj sciencaj kolegoj, uzantoj de Esperanto por puraj praktikaj celoj, ja apartenas al la esperantistaro malgraŭ tio, ke ili ne deziras esti tiel nomataj. Kiel privataj personoj, interkompreniĝantaj per la Esperanta kodo, ili rajtas rifuzi agnoski aŭ apogi la revojn, esperojn kaj agojn de aliaj esperantistoj. Tamen, paradokse, la Esperanto-movado ne ignoras ilin, kaj vole-nevole ili fariĝos partoprenantoj — eĉ se nur periferiaj — en la tradicion.

Bedaŭrinde la afero ne povas tiel resti, ĉar d-ro Frank postulas, ke la Esperanto-movado ne plu uzu la lingvonon Esperanto, precipe propagandecle inter sciencistoj. Anstataŭe, li proponas, ke oni parolu pri „Internacia Lingvo“. Frank bazas sian rezonadon sur la opinio, ke la origina nomo de la lingvo de Zamenhof estas „Internacia Lingvo“, dum „Esperanto“ estas nur kromnomo. Pri tio Frank eraras. Trakribado de la verkoj de Zamenhof indikas, ke „lingvo internacia“ estis nur unu el la nomoj, kiujn la aŭtoro de Esperanto uzis. La titoloj de liaj unuaj praesperantaj projektoj estis „lingvo universal“; poste li uzis la esprimon „lingvo internacia“. Ekde 1889 estis aldonita al „ling-

vo internacia“ la vorto „Esperanto“ kiel lingvonomo, kaj finfine ĝi sola restis. El tio ĉi estas tirebla la konkludo, ke Zamenhof mem akceptis la nomon Esperanto por sia lingvo kaj uzis ĝin *anstataŭ* „lingvo internacia“. La nomo Esperanto, do, funkcias same kiel fabrikmarko. Kvankam aliaj planlingvistoj povas nomis lingvon internacia lingvo, imitaĵoj de Esperanto devas esti alimaniere nomataj, ekzemple Esperantido, Nov-Esperanto, k. s. „Internacia Lingvo“ ne konvenas kiel nomo de specifa planlingvo, ĉar ĝia signifo estas tro ĝenerala. Estis, estas kaj estos pluraj internaciaj lingvoj. Laŭ la ĝisnuna nestrikta difino, internacia lingvo povas esti etnolingvo aŭ planlingvo, lingvo vaste uzata tra la mondo, sed ne oficiale, aŭ oficiala lingvo uzata inter nacioj, sed ne vaste. La termino, do, povas signifi ĉion al ĉiu.

Frank marteladas la punkton, ke la nomo Esperanto ne taŭgas por sciencistoj, ĉar ĝi signifas „ne nur la neŭtralan kodon, sed ankaŭ la kulturajn valorojn, la literaturon, la movadon, la tradicion“. Laŭ lia interpreto „Internacia Lingvo“ signifas „nur la lingvon mem, la science utilan kodon“. Pro tio Frank postulas, ke esperantistoj evitu la uzon de la nomo Esperanto „en ĉiuj oficialaj tekstoj kaj gazetarinformoj rilate AES“, kaj li insistas, ke oni uzu (kvazaŭ eŭfemismo!) „Internacia Lingvo...eventuale mallongigite kiel I.L. aŭ ILo“.

D-ro Frank kuraĝas peti tiun kompromison flanke de la Esperanto-movado: li eĉ retorike nomas ĝin „historia kompromiso“. Mia opinio, se la esperantistaro akceptas tiun proponon uzi nur la karaktermankan nomon Internacia Lingvo aŭ la nudajn kriptajn I.L. kaj ILo (eĉ se nur en limigitaj rondoj de sciencistoj kaj alispekaj „praktikaj“ homoj) tio signifos ne kompromison, sed kompromiton por la movado. Oni ne forgesu, ke malgraŭ la furora propagando pri la Akademio Internacia de Sciencoj, ĝi ankoraŭ estas nur surpapera afero. Cetere, estas substrekte en la fina rezolucio de la Iniciatgrupo de AIS, ke Esperanto „nur servas kiel unu el la oficialaj kaj laboraj lingvoj de AIS“. Laŭ mia scio neniu alia organizaĵo aŭ konferenco ĝis nun malfermis la pordon al Esperanto nur kondiĉe, ke ĝi ŝangu sian nomon por povi funkcii kiel oficiala aŭ labora lingvo. Kial, do, la esperantistoj nun klinu sin antaŭ Frank kaj la AIS-anoj?

Bernard GOLDEN

GAZETARA KONFERENCO EN PISANICA

La Sofia Esperanto-Domo de Kulturo „Maksim Gorkij“ organizis en la Internacia E-Kursejo en Pisanica (12.-14.12.85) renkontiĝon de ĵurnalistoj el la amaskomunikiloj kun la Estraro de BEA lige kun la antaŭstaranta 100-jara jubileo de la internacia lingvo Esperanto. Ĉeestis 17 reprezentantoj de la ĉefurba gazetaro, korespondantoj de la Bulgara Televideo kaj Radio, ĵurnalistoj el distriktaj gazetoj.

Elstaraj funkcioj de BEA konigis al la ĉeestantoj problemojn de la internacia kaj bulgara E-movado: „Aktuala stato kaj perspektivoj de la nuntempa internacia E-movado“ (Inĝ. Petăr Todorov — vicprezidanto de BEA, estrarano de UEA); „Mondpaca Esperantista Movado — kontribuo al la pachtalo de la popolo“ kaj „Strukturo de la internacia lingvo Esperanto“ (Violin Oljanov — ĉefredaktoro de revuo „Paco“); „La Internacia E-kursejo kaj la praktika aplikado de Esperanto“ (Inĝ. Angel Todorov — ĉefdirektoro de IEK).

Grandan intereson ĉe la partoprenintoj en la gazetara konferenco vekis la aplikado de Esperanto en komputiloj, kunlaborado kun UNESKO, sendeviza interŝanĝo de turistoj kaj profesiuloj, TEJO-agado, TEJA kaj aliaj E-organizaĵoj, Esperanto kiel planlingvo kaj aliaj problemoj.

La ĵurnalistoj faris multajn demandojn lige kun Esperanto. Ili opinias, ke la ideo pri efektiveco de simila renkontiĝo estas bonega, kaj eventuala nova pli amase vizitita seminario kontribuos por la popularigo de la E-movado en nia lando.

Nedka VALJAVIČARSKA

En la lando de lotusfloroj

(Vojaĝnotoj)



Mia iama veturado tra Ĉinlando impresis min neforgeseble kaj mi decidis surpaperigi miajn travivaĵojn.

La aŭtoro

URBO ĈE LA LANDLIMO

La unua ĉina urbo, kiun mi vizitis estis Manĉurio. Kune kun aliaj gastoj el Eŭropo, oni invitis nin al vespermanĝo en samnoma restoracio. Oni surprizis nin per la menuo, kiu konsistis el dekkvin

pladoj — ovoj konservitaj laŭ ĉina maniero, maraj moluskoj, salato el laminario, kokidaĵo k. a. Forkoj mankis. Ni devis manĝi per vergetoj. Ĉar mi ne havis apetiton al ĉinaj delikataĵoj, mia akompananto kaj tradukisto Lu Gang, malaltstatura ĝentila junulo, montris per ebura vergeto al la telero kun nigraj moluskoj kaj eksplikis:

— Oni bredas la moluskojn en la Flava Maro. Fiŝistoj subakvigas kaj kaptas ilin per specialaj retoj. Oni manĝas ilin kun salato el laminario.

Li prenis per la ebura vergeto paron da moluskoj kaj metis ilin antaŭ mi. Vole-nevole, por ne ofendi la gastigantojn, mi gustumis. Manĝetis. Post tio Lu Gang montris la ovoj kaj diris:

— Tio estas „pidan“, t.e. konservitaj ovoj. Kiel oni konservas

ilin? Jen kiel: oni metas freŝajn ovojn en potojn kaj surŝatas ilin per miksado el argilo, cindro, kalko kaj salo. En tia stato ili restas dum unu monato kaj tiam estiĝas mangopretaj. Ni ĉinoj tre ŝatas konservitajn ovojn.

Mi senŝeligis kaj manĝis ovon nigrakoloran.

Nova surprizo — laŭ ĉina maniero, la lasta plado estas la suplo! Supo kun cepo kaj flavaj viandpecetoj. Ni trinkis la supon el porcelanaj glasoj...

La sekvantan tagon ni veturis tra la montaro La Granda Ginggaŝ. La deklivoj estis jam orumitaj de la aŭtuno. La trajno eniris la provincon Hejlonggjan. La kampoj estis homplenaj. Kamparanoj en egalaj bluaj vestoj rikoltis milion „gaolian“ kaj sunflorojn.

— En tiu ĉi provinco — parolis Lu Gang — bone vegetas la milio. El ĝiaj trunkoj oni produktas maŝojn kaj uzas ilin kiel brullignon. Antaŭ la revolucio la agroj apartenis al feŭduloj, sed nun ili estas popola posedaĵo.



„SUR LA VOJSTREKO „HO CHI MINH“ (kolekto de ĵurnalistaj artikoloj, noveloj, rememoraĵoj el du taglibroj kaj el romano), p. 237, 19×12,7 cm. Fremdlingva Eldonejo, Hanoj, 1984.

Tiu ĉi libro konsistas el verkoj de 18 aŭtoroj el Socialisma Respubliko Vjetnamio. En siaj kontribuoj ili konigas tre interesan materialon pri la iama militsekreto — La vojstreko „Ho Chi Minh“. La leganto „propraokule“ vidas kiel oni esploris kaj konstruis sekretajn vojojn tra montoj kaj densaj arbaroj, kiel funkciis la ĉiufanka helpo el norda al suda Vjetnamio en la naciliberiga milito kontraŭ la imperiismo kaj ties lakeoj (1958—1975). En 1964 en la milito kontraŭ Vjetnamio memvole sin engaĝis ankaŭ la usona imperiismo. En 1975 la imperiismo kaj ties lakeoj malvenkis. Vjetnamio unuiĝis kaj fariĝis socialisma lando. La verko estas tiom interesa, ke ĝi estas legata „unuspire“. Kubo kaj Vjetnamio donis bonan lecionon al la usona imperiismo. Ĉu tio ne sufiĉas? Tie, kie la popolo aktive zorgas pri sia sorto, ĝi trovas manieron gardi sian sendependecon, eĉ kontraŭ la fortega imperiismo de Usono.

S.R.Vjetnamio fariĝis fruktodona kampo por Esperanto-movado. Antaŭ 25 jaroj ĝi eldonis sian unuan libron en Esperanto, la kolekton de noveloj „Pro unu bovino“. Jam tiutempe iu el la recenzintoj bondeziris, ke ĝi estu sekvata de pluraj aliaj. Kaj efektive dum la pasinta kvaronjarcento la esperantistaro tutmonda havis eblecon legi centon da Esperantaj libroj el Vjetnamio pri diversaj fakoj. La gloraj bataloj kontraŭ la imperiisma sistemo en Vjetnamio estis akompanataj de abunda libroeldonado en Esperanto. Socialisma Respubliko Vjetnamio kontribuis per granda kvoto al la internacia, al la socialisma kulturo de la homaro.

Canko MURGIN

BONSANCON, „OVO!“

„OVO“ — internacia gazeto por distro kaj amuzo. Aperas 15-foje jare. Eldonas: Kroatia E-ligo, Amruŝeva 5/1, 41000 Zagreb, Jugoslavio. Ĉefa kaj respondeca redaktoro: Slavko Simunić — 21×30 cm; 12 paĝoj (inkluzive la kovrilpaĝojn).

„Jam delonge sentiĝas la manko de revuo, kiu estos alloga legaĵo por komencantoj (ĉefe junularo) kaj enhave kaj laŭ la lingva facileco. . . Jen kial ni lanĉis OVO-n. Ĝi servu al multaj, kiuj deziras facilan kaj amuzan periodaĵon.“

La supre cititajn vortojn oni povas tralegi sur la kovrilpaĝo de la unua aperinta numero de „OVO“, la internacia gazeto por distro kaj amuzo.

En ĉi numero oni trovos interesan intervjuon kun Mladen Drajetin — la iniciatinto de „ko-

SENJANG (MUKDENO)

De malproksime videbliĝis la granda industria urbo. La ĉielo super ĝi estis fumoplena. Iom da historio rakontis Lu Gang: disbatiĝis, la japanaj militistoj forkuris el la urbo en 1945 por ne fariĝi militkaptitoj de la soveta armeo. Forkurante ili detruis multajn fabrikojn, sed la ĉinaj laboristoj rekonstruis ilin.

La sekvantan tagon ni vizitis la industrian kvartalon. Tie ni vidis malnovajn uzinojn, en kiuj loĝis laboristoj. En la kontoro de iu fabriko funkciulo de la sindikatoj rakontis ĉe glaso da teo:

— Tiu ĉi entrepreno fariĝis ŝtata en 1949. Ni laboradis tutan jaron por modernigi ĝin. Nin helpis specialistoj el Sovet-Unio, ĈSSR, kaj GDR. Dank'al ilia valora helpo ni komencis produkti tornilojn. Multaj el ni veturis en Sovet-Union, kie ni studis. Mi mem fariĝis inĝeniero en Moskva Instituto.

Post la mallonga interparolo la funkciulo kondukis nin al diversaj fakoj en la uzino. Plej interesa por

ni estis la fako, kie oni produktas traditojn — pli ol 80 specojn.

Sekvis vizito al komunumo „Ruga Stelo“. En la vilaĝo ni trafis nur infanvartistinon kun kelkdeko da infanoj bunte vestitaj. La infanoj renkontis nin skandante: Ju-i (amikeco). La vilaĝanoj rikoltis rizon kaj ni devis atendi ilian revenon.


Subite iu komencis tamburi. Mi demandis mian akompananton, kion tio signifas? Lu Gang interŝanĝis kelkajn vortojn kun la infanvartistino kaj flustris:

— Sekvu min.

Ni alpaŝis unuetaĝan domon kaj vidis, kiel iu homo en griza mantelo tamburas, rigardante al la ĉielo.

— Mi rakontis al vi pri la feŭduloj. Jen unu el ili. Li tamburas, ke lin aŭdo Budho. Vane. Niaj kamparanoj neniam redonos la agrojn al la iamaj bienposedantoj, kiuj ekspluatis ilin kruele.

Vespere la kamparanoj hejmenvenis. Lu Gang interkonsiliĝis kun la vilaĝestro, kiu proponis, ke ni



Laboristoj instalas ekipaĵon

responda teatro" en Novi Sad. Intereso por la plej junaj legantoj (kaj ne nur por ili!) estas la bildstrio „Kiko“. En la unua numero de „Ovo“ estas aperigita la unua parto de romano en daŭrigoj „Ili kaptis Elzan!“ de Johan Valano. La lastaj paĝoj konsistas el multaj amuzaj partetoj pri strangaĵoj kaj interesaĵoj sub titolo „Bunta terglobo“.

Kiel estas skribite sur la unua „Ovo“-paĝo, en ĝi ne estas loko por organizaferoj de la E-movado. „Ovo“ devas esti bunta, varia, iomete satira, amuza, distra.

Veneta BALEVA

FAKA LIBRO EN ESPERANTO

En 1984 Scienca Eldona Centro en Budapeŝto eldonis la libron „Amuza matematiko por gelernantoj“ de la bulgaraj geesperantistoj-matematikistoj Petko Arnaudov kaj Ljudmila Arnaudova. Tiu libreto estas paŝo al la enkonduko de Esperanto en sciencajn fakojn —

evento tre dezirata de ni esperantistoj. Laŭ mi tiu estas la unua libro en Esperanto pri amuza matematiko. Ĝia celo estas doni materialon (konsiloj, taskoj, interesaj pensoj kaj rakontoj pri matematiko kaj matematikistoj, demandoj por konkursoj, poemoj pri matematiko, matematikaj ludoj k.t.p.) por la kunvenoj de lernejoj matematikaj studrondoj, por la gvidantoj de tiuj rondoj. La akcento estas sur amuzaj matematikaj rimedoj por tiuj kunvenoj, sed estas sufiĉe granda nombro de tute seriozaj matematikaj taskoj. Evidente la aŭtoroj havas grandan praktikon en la gvidado de matematikaj rondoj por lernantoj de diversaj klasoj (iuj taskoj estas grupigitaj laŭ la klaso de gelernantoj). Mi gratulas la aŭtorojn pro ilia granda kaj bonkvalita laboro kaj sendas alvokon al aliaj fakuloj — sekvu la ekzemplon de P. Arnaudov kaj L. Arnaudova — verku fakajn librojn en Esperanto!

Doc. ing. Stojĉo STOJĈEV

Novaj libroj

Deneva, Daniela: Matematika terminaro. Esperanta-bulgara-rusa. p. 160, 14×12 cm, Eld. BEA, Sofio, 1985, Prezo: 1,20 lv.

La aŭtorino celis kolekti la pli gravajn matematikajn terminojn por faciligi la laboron de esperantistoj-sciencistoj.

● ● ●

Interlingvistiko, Esperantologio. Red.: Violin Oljanov. p. 251. 14×21 cm, Eld. BEA. Sofio 1985. Prezo: 2,05 lv.

gastu al iu maljunulino, kiu distingiĝas per sia bona laboro en la Kooperativo. Antaŭe li konigis al ni la sorton de la virino:

— Vi vidos, ke ŝi aspektas maljuna, sed fakte ŝiaj jaroj ne nombras pli ol kvindek. Dekjara ŝi perdis gepatrojn kaj tuj edziniĝis. La bopatrino malbontraktis ŝin. Kune kun ŝia edzo ŝi dungigis ĉe la bienulo, kiun vi aŭdis tamburi. La juna paro laboris senripoze, ŝparis iom da mono kaj aĉetis terpecon. Kiam japanoj okupis nian regionon, oni mobilizis ŝian edzon en la helptrupojn. Oni turmentis kaj eksplutatis la edzon. Iuvspele li revenis malsana, vomis sangon kaj mortis. Nun la vidvino laboras en la kooperativo, zorgas pri la kokinoj.

La blankhara virino afable invitis nin en sian fanzon (vilaĝan dometon). Regalis nin per kuiritaj arakidoj. Mi pridemandis ŝin pri tio kaj alio kaj ni adiaŭis.

Iu knabineto fiksrigardis min. Mi demandis pri ŝia nomo.

— Ĉinaj nomoj ne similas al la nomoj de eŭropanoj.

— Per kio distingiĝas la ĉinaj

nomoj?

— La deveno de la familiaj nomoj estas ligita kun la provinco aŭ la feŭdo. Pro tio ĉe ni unue oni skribas la familian nomon, poste la personan. Milionoj da homoj alproprigas al si la nomojn de antikvaj ĉinaj regnoj kaj provincoj, aŭ laŭ sia profesio.

— Interese, kiom da nomoj ekzistas en via lando?

— Iu historiisto kolektis 3 600 nomojn, sed la plimulto estas mortaj, neuzataj.

— Ĉu oni baptas la infanojn?

— Ne. La infanoj portas nur familiajn nomojn. Kiam la infano estiĝas plenkreska, ĝi elektas por si personan nomon, ordinare simbolean. La persona nomo estas unu- aŭ duŝilaba.

— Kaj ĉu la virinoj estas devigataj proprigi al si la familian nomon de la edzo?

— Laŭ leĝo de 1950 jaro la virino ne estas devigata proprigi al si la nomon de la edzo.

ANSAN

Sude de Ŝenjang situas alia industria urbo Anŝan. Ĝi impresas

La volumo enhavas artikolojn pri interlingvistiko kaj esperantologio. Inter la aŭtoroj estas d-ro André Albaut, d-ro Stojan Guĝev, d-ro Detlev Blanke kaj aliaj.

● ● ●

Djulgerov, Petro: La Paco kaj la Sindikatoj. Enkonduka parolado antaŭ la Internacia Sindikata Renkontiĝo-Dialogo „La paco kaj la Sindikatoj“, okazinta en Sofio, Bulgario, en oktobro 1984. Broŝuro. Eld. Centra Konsilio de Bulgaraj Sindikatoj, Sofio, 1985. Trad. Nikola Aleksiev. Red. Asen Grigorov. Eldonvanto 3000 ekz. 21,5×13,5

G. M.



Kunlaborantino de Shanghai-a Geknaba Domo prezentas interesajn legaĵojn al la geknaboj

per la ŝtaluzino, reluzino kaj maŝinkonstrua uzino. En la kulturdomo oni rakontis:

— La japanaj militaristoj detruis la uzinojn kaj fanfaronis, ke en Anŝan oni neniam plu gisos ŝtalon. Tamen tuj post la milito niaj gisistoj kolektis ducent milojn da instrumentoj. Sovetaj inĝenieroj



JORDAN JOVKOV
(1880—1937)

La bulgara klasika prozo havas kelkajn suprojn. Unu el tiuj suproj estas la eminenta humanisto Jordan Jovkov. Komencinte verki en la unua duono de la XX jc, stajn ĉefverkojn tamen li kreas en la periodo inter la Unua kaj Dua mondmilitoj. Lia verkaro estas plene aktuala ankaŭ hodiaŭ.

La plej grava leciono, kiun Jovkov testamentis al ni estas malam al ĉiu perforto, adorado de la homo.

En la mondo de li kreita ne blovas la vento de grandaj sociaj ŝanĝoj, la ĉielon ne tranĉas la fulmotondroj de epokofarantaj eventoj. La sociajn konfliktojn en lia verkaro anstataŭas konfliktoj moralaj. La aŭtora atento estas koncentrita sur la kardinalan problemon: kiel venki la malbonon en si mem.

En epoko, kiam ĉiuj etikaj kriterioj en certa grado senvalorigis, la verkisto enprofundiĝas en la pasinton de sia popolo por doni vivon al aliaj, forgesitaj virtoj — amo, sinofero, kuraĝo, patriotismo... Sed estus erare opinii, ke Jovkov apartenas nur al la pasinteco — li turnis sin al la pasinteco por veni al la nuntempo; li prikantis mondon jam forpasintan ne ĉar ĝi estis pli perfekta ol lia nuntempo, sed ĉar, rigardata tra la prismo de rememoroj

kaj revoj, ĝi transformiĝis en Mondon Belegan.

En relative mallonga periodo Jovkov aperigis 15 volumojn: 8 rakontokolektojn („Samvilaĝanoj“, „Apud Mesta-rivero“, „Ili venkis“, „Kanto de la veturilrado“, „Balkanmontaraj legendoj“, „Vesperoj en la gastejo de Antimovo“, „Virina koro“, „Se ili povus paroli“), la novelon „Rikoltisto“, du romanojn („Bieno ĉe la landlimo“, „La aventuroj de Gorolomov“) kaj kvar teatraĵojn („Albena“, „Borjana“, „Milionulo“, „Ordinara homo“).

Supro de la Jovkov-verkaro estas liaj simplaj kaj saĝaj rakontoj, en kiuj vivas ideoj universalaj, tuthomaraĵ. Dank' al ili Jovkov apartenas ne nur al Bulgario, li apartenas al la tuta homaro — liaj verkoj estas tradukitaj en pli ol 35 lingvojn.

La blankaj rozoj

JORDAN JOVKOV

Je vesperigo Spas, unu el la ok volontuloj gardostarantaj ĉe la ponto, sidiĝis ekstere sur la benko. Kiel kutime, unue li ĵetis rigardon al la ĝardeno de Gergilan vidalvide

kaj al la ŝtonmuro kovrita de blankaj rozoj. Jus ĉesis pluvi kaj nun ĉio aspektis iom alie. Rozoj elrampis el la terassimila ĝardeno de Gergilan situanta kvin-ses metrojn

helpis rekonstrui la gisfornojn kaj ĉiujn uzinojn. Nun en nia urbo estas pli ol ducent mil gisistoj kaj muldistoj, kiuj produktas pli ol 120 diversajn fabrikojn, inter ili relojn, diversajn ladojn, akvokondukajn tubojn...

TIANGIN (TIENTSIN)

Laŭ la nombro de sia loĝantaro, Tiangin estas la tria laŭ grandeco urbo en Ĉinio. Ĝi situas ĉe la Granda Kanalo kaj sur ambaŭ bordoj de la navigebla rivero Haj. La urbo estas rimarkinda per la setlementoj. La rajton posedi setlementojn ricevis la okcidentaj ŝtatoj post la Dua Opia Milito (1856—1860). Kion prezentas el si la setlemento? Urboparto, ĉirkaŭita per altaj muroj kaj pikdrato. Interne troviĝas bankoj, kontoroj, hoteloj, restoracioj kaj loĝejoj de la koloniistoj.

Tiangin estiĝis vera urbo en la fino de la 19-a jarcento, kiam komenciĝis la bataloj por influferoj en Ĉinio. Ĉi tie posedis setlementojn britoj, francoj, germanoj kaj italoj. Post la Unua Mondmilito ven-

kita Germanio cedis sian koncesion al Belgio.

Kvankam la setlemento nun estas propraĵo de la ĉina popolo, ĉe pordego staris tabelo: „La eniro estas malpermesata por ĉinoj“.

— Nia popolo neniam pardonos al la koloniistoj, kiuj rilatis al ni kiel al hundoj, — diris Lu Gang.

Kiam la japana armeo okupis la urbon, oni forpelis la okcident-eŭropajn komercistojn kaj propriĝis al si ilian havaĵon kaj kiam en 1945 unumiliona japana armeo kapitulacis antaŭ la soveta armeo, tio servis kiel signalo por la ĉina naciiberiga armeo. Ĝi forpelis la hordojn de la reakciaj ĉinaj generaloj.

Proksime de la setlemento troviĝas librejo. Ni eniris. Kelkaj gejunuloj foliumis aŭ legis bele binditajn volumojn.

— En ĉinaj librejoj oni permesas legi, — diris Lu Gang, — ĉar ordinaro la junuloj ne disponas monon por aĉeti libron.

— Versajne ne estas facile legi pro la hieroglifoj?

— Vi prave konjektis. Ne estas facile, tamen iuj influaj lingvistoj ne rekomendas reformon de la nuna sistemo. Ili asertas, ke nia popolo perdos sian specifecon, se ĝi forĵetos la hieroglifojn. Aliaj scienculoj opinias, ke se oni enkondukos la latinan alfabeton, tiam por la fremduloj estos pli facile ekkoni la historion de la ĉina popolo, kiu havas kvinmiljaran ekziston.

La sekvantan tagon ni veturis al la havenurbo Singang. Nia aŭto saltetis sur la disbatita ŝoseo.

Proksime de la haveno elstaris montetoj el salo.

— Nuntempe, — ekparolis Lu Gang, — salon oni aĉetas en ĉiu butiko, sed dum la japana okupacio estis tute alie. La japanaj generaloj konfiskis la salminejojn kaj vendis salon al ni ĉinoj nur kontraŭ argentaj aŭ oraj moneroj.

HO MO GO
(Daŭrigota)

super la nivelo de la strato. Supre, kie finiĝis la muro — tie komenciĝis la ĝardeno. Granda bulforma juglandarbo larĝe etendis siajn branĉojn kaj ĵetis densan ombreon. Sub ĝi, simila al antikva fortikaĵo, vertikale malsupreniĝis la ŝtona muro kovrita ĝis la mezo de florantaj blankaj rozoj. Kiom multe da rozoj estis tie! Jen similaj al blanka tapiŝo, jen pendantaj kiel pezaj girlandoj — banitaj de la pluvo puraj blankaj rozoj. Sur ili ankoraŭ estis pluvgutaj kaj la tero sube estis blanka pro la falintaj rozpetaloj — kvazaŭ kovrita de neĝo.

Kvankam zorgoplena, Spas estis kortuŝita — tiom bela estis tiu ĉi bildo! Lia vizaĝo heliĝis pro tenebreco. Tondris kaj li rigardis orienten: malantaŭ la ruĝaj tegmentoj de la domoj, post la horizonto malaperis violkolora nubo. Spas ek-tremis. Tiu nubo, kiu pasis super la vilaĝo kaj nun foriris, ne estis danĝera. Ĝia malproksima obtuza tondrado tamen ege similis la kanonpafadon, aŭdigantan kiam regis silento aŭ kiam la vento blovis de la direkto, kie estis la fronto. Tie oni ĉiam ankoraŭ batalis.

Neniu estis sur la strato. Sed jen aperis la instruistino Angelina en robo ruĝa kiel floranta papavo. Ŝia vizaĝo estis brunhaŭta, kiel de rikoltistino. Preterpasante, ŝi rigardis al Spas per siaj nigraj migdalformaj okuloj kaj ridetante salutis lin. Kun serioza mieno, li sekvis per rigardo la instruistinon. Ŝi paŝis facile kaj ŝiaj malgrandaj ŝuoj lasis blankajn spurojn, ĉar la pluvo apenaŭ malsekigis la polvon.

La instruistino pasis tra la ponto, venis ĉe la ŝtona muro kaj rigardis supren. Eble ŝi kriis ion, tamen Spas ne povis aŭdi. Dum kelka tempo tie estis videblaj nur la blankaj rozoj supre kaj la junulino en ruĝa robo malsupre. Sed jen ĉe la juglandarbo aperis Gergilan, ekridis kaj ektondis per sia basvoĉo. Li detranĉis rozojn, faris grandan bukedon kaj lasis ĝin fali en la manojn de la instruistino. Ŝi kaptis la florojn, preskaŭ kaŝis sian vizaĝon en ili, enspirante la eligitan bonodoron, rigardis ankoraŭfoje al Gergilan kaj ekiris laŭ la strato. Gergilan sekvis ŝin per okuloj kaj ridetis.

Spas kolere murmuris ion. Li ne ŝatis tiun ĉi Gergilan — pli ol okdek jarojn li havas kaj tamen ankoraŭ ĝapas post la junulinoj. Spas severe juĝis ankaŭ la instruistinon. Krome, li malofte estis bonhumora, ĉar li suferis je stranga malsano: nenio lin doloris, sed de tempo al tempo li falis en tian malsekeran kaj senesperan animstaton, ke la sola maniero trankviliĝi estis marŝi. Ankaŭ nun, sentinte ke la insida malsano lin atakas, li saltis, eniris la domon, kaptis sian fusilon, aŭdigis sin al la

ĉefo de la gardistaro kaj ekmarŝis laŭ la strato.

Preterpasante la ŝtonmuron, li eĉ ne rigardis supren, sed de tie aŭdigis gaja laŭta voĉo:

— Spas, he, Spas!

Spas levis la kapon: trans la amaso da blankaj rozoj, kvazaŭ post blanka lavango, staris Gergilan, kun kuspe falditaj manikoj kaj krurumoj. Malseka, grandbarba kiel popo, ridetanta. En la manoj li tenis butilon.

— Kien vi urĝas vin? Atendu iom, ankaŭ al vi mi donos bukedon.

— Mi ne bezonas viajn florojn — abrupte diris Spas. — Rozoj... Ja mi vidis al kiu vi donas rozojn...

Gergilan ŝovis la fingrojn en sian blankan barbon kaj ekridis:

— Sed kion malbonan mi faris, he Spas? Ŝi estas juna, antaŭ ŝi estas la tuta vivo! Kaj ni? Al neniu plu ni estas bezonaj, ĉu ne?

— Vi ne pravas...

— Tiel estas Spas, tiel estas. Ĉu vi kredas, ke iu timas la fusilon, kiun vi portas surŝultre? Kontraŭ musoj vi gardas la ponton. Ja ĉion gravan faras la junuloj. Ĉi-nokte mi denove aŭskultadis la kanonadon: buh, buh! Kaj mia koro kunpremiĝas — pereas junuloj, Spas, pereas la kompatindaj!...

Spas senespere svingis per mano kaj, pelate de sia sufero, intencis ekiri, sed faris kelkajn paŝojn reterne kaj kriis:

— Ne estas tiel, avo Ivan, ne estas tiel. Juneco, vi diras. Mal-longaj roboj, silkaj ŝtrumpoj, ruĝigilo, pudro kaj pomado — ne decas tiel, ne! Ŝi pli bone zorgu ŝparrion da mono ĉu ne? Se ŝiaj gepatroj estus sufiĉe bonhavaj, ili ne permesus al ŝi esti instruistino.

— Sed ĉu pri la instruistino vi parolas?

Tamen Spas jam rapidis laŭ la strato, tial Gergilan, ĵetinte rigardon post li, kolere diris:

— He, kia strangulo... Vidu lin nur!...

Incitita, enprofundiĝinta en siajn pensojn, turmentata ankaŭ de sia malsano, Spas marŝis rapide kaj ne rimarkis, kiam li preterpasis la komunuman domon kaj la preĝejon. Li ĉiam ankoraŭ pensis pri la instruistino. En la montara vilaĝo, kie li loĝis antaŭ la milito, li estis lerneja kuratoro, tial laŭkutime, kaj ankaŭ pro deziro malbonfari, kian inklinon li havis, li kaŝe observis ĉiun paŝon de la instruistino. Li rimarkis, ke ŝi ne ĉiam venas ĝustatempe por la komenco de la lernohoro — la lernantoj petolas en la korto, interbatiĝas, kaj estas neniu por prizorgi ilin. La instruistino legis librojn, ludis gitaron, vestis sin en vilaganaj vestoj kaj promenadis kun la vilaĝaj junulinoj. Ŝi skribis multajn leterojn kaj ankaŭ ricevis multajn leterojn. Ŝi ofte iris en la komunumejon kaj interparolis kun la skribistoj. Foje al ŝi venis gastoj al la korto, kaj li vidis, kiel

ŝi fumis kune kun ili cigaredon. Ĉion ĉi Spas estis detale priskribinta sur tutaj tri paĝoj kaj intencis sendi tiun leteron al la inspektoro. Sed ĉar ankoraŭ unu paĝo restis neplenigita, kaj li ne volis eluzi senutile la paperon, li decidis atendi por kompletigi la leteron per iuj aldonaj informoj kaj tiam sendi ĝin.

Aŭdigis malproksima kanto kaj Spas donis oreleon. Ŝajne kantis soldatoj. Poste aperis blankaj soldataj ĉapoj kaj ĉevaloj. Venis militistaro — io tre ordinara, ĉar la ŝoseo pasanta tra la vilaĝo, kondukis al la fronto. Ĝuste pro tio volontuloj gardis la ponton. Spas decidis ekscii pri kio temas kaj direktiĝis tien.

Sur iu vasta herbejo apud la vilaĝo li vidis centon da soldatoj, kiuj desaltis de la ĉevaloj kaj promeniĝis ilin. Aliaj soldatoj enpikis palisojn kaj streĉis ŝnurojn inter ili, triaj fosis kavetojn por la fajroj, necesaj por la soldata kuirrejo. Ektintis spronoj, kvazaŭ ekkantus griloj kaj Spas turniĝis: rekte al li venis oficiro. Li estis sen sabro, marŝis kun disetenditaj kruroj, kiel kutime marŝas kavalerianoj. En unu mano li tenis skurĝon kaj vipis per ĝi sian boton. Estis juna, larĝŝultra belulo.

— He, soldato, de kie vi estas? — li demandis Spason.

Spas rigardis tiun senbarban junulon, dufoje pli junan ol li, kaj respondis kiel decas por soldato:

— De tiu vilaĝo ni estas, sinjoro subleŭtenanto. Ni gardas la ponton.

— Nu bone... Kaj ĉu vi konas la ĉi-tiean instruistinon? Ŝia nomo estas Lina¹, ĉu ne?

— Tute ne, sinjoro subleŭtenanto. Ŝia nomo estas Angelina.

La subleŭtenanto ekridis:

— Nu bone, bone. Ĉu vi povas konduki min al la lernejo?

— Jes, mi povas, sinjoro subleŭtenanto.

Spas tuj metis la fusilon surŝultre kaj ekmarŝis antaŭ la oficiro. Li jam komprenis, kia estas la afero kaj bolis pro kolero, sed estante senpova fari ion ajn, marŝis ne turniĝante kaj aŭskultis la tintadon de la spronoj kaj skurĝofrapon sur la boto post ĉiu dua paŝo. La lernejo estis jam proksime. Tra la malfermita fenestro ili unue vidis la ruĝan robon de la instruistino kaj poste — ŝian vizaĝon kun nigraj okuloj kaj okulharoj. Ŝi rigardis al ili kaj ridetis — ne ĉar rekonis ilin, sed simple tiel, kiel ŝi ĉiam ridetis. Tamen jen subite ŝi retirigis de la fenestro, malaperis kaj post momento jam kuris tra la korto al ili, kriante:

— Mitis, Mitil!

— Lina! — kriis la oficiro kun etenditaj al ŝi manoj, jam kuran-te antaŭ Spas.

Ili tenis sin je la manoj, parolis ion samtempe kaj iliaj okuloj brilis pro ĝojo. Poste, ĉiam tiel tenante sin je la manoj, ili eniris en la lernejon.

Spas frotis tindrofunĝon por bruligi sian cigaredon. Ŝajne nenio okazis, kaj tamen liaj manoj tremetis. „Bone, bone — li pensis. — Ni vidos tion.“ Ĉion ĉi li aldona en sia letero al la inspektoro, eble la malplena pago eĉ ne sufiĉos. Sed li devas ĉion bone pripensi. Kaj nun li devas pli bone informiĝi pri la ĵus alvenintaj soldatoj, por povi raportoj al sia ĉefo. Tial li metis la fusilon sur-sultre kaj direktiĝis al la vilaĝo.

Ĝustam la sama nokto Spas patrolis tra la vilaĝo. La soldata bivako, kiu ĝis antaŭ nelonge zumis kiel abelujo, nun estis silenta, la vilaĝo dormis. Nur en unu domo lumis fenestro — tie loĝis la instruistino kaj ĉe ŝi estis la oficiro. Spas iris tien-reen, malproksimiĝis je kelka distanco, sed ĉiam denove revenis kaj ne ĉesis observi la luman fenestron. La oficiro ankoraŭ ne eliris, tial Spas ĉiam pli kole-ris kaj kredis, ke li havos sufiĉe da kuraĝo por fari tion, kion li decidis. „Kial ne diri al li? — li pensis. — Sinjoro subleŭtenanto, li diros, pardonu min kaj ne ofendiĝu, mi petas... sed kion parolos la homoj pri tiu junulino... Vi ne devas tiel kondukti, ne decas tiel!“

Subite aŭdiĝis pordofrapo, interparolo kaj tintado de spronoj sur la ŝtuparo. Spas kaŝis sin en la ombro de la plektobarilo. Lumis plena luno kaj ĉio estis videbla kiel tage. La oficiro kaj la instruistino iris tenante sin subbrake. Sur la brusto de la eficiro estis kelkaj blankaj rozoj — el tiuj, kiujn hodiaŭ avo Gergilan donis al la instruistino. Li ridetis, ridetis ankaŭ ŝi. Poste ili haltis kaj, starrante proksime unu de la alia, ek-rigardis al la ĉielo. Spas ankaŭ levis la kapon supren kaj same kiel ili vidis la mildan rideton de la luno.

La instruistino kaj la oficiro eliris el la kortopordo kaj haltis. Nun ili parolis mallaŭte. Subite Spas aŭdis ploron. Ploris ŝi. Nur antaŭ kelkaj minutoj ŝi ridis, kaj nun ploris mallaŭte kaj kortuŝe! Ŝia mano estis sur la ŝultro de la oficiro, ŝia kapo kuŝis sur lia brusto. Ŝi tremis per la tuta korpo, kiel timigita birdeto.

— Aĥ, Mitjo, Mitjo...

— Ne ploru, Lina. Vi ne pensu, ke en la milito ĉiuj pereas. Ni dev-nove intervidiĝos.

— Ho, Dio mia...

Spas aŭskultis rigidiginte, io sufokis lian bruston. Li ne plu aŭdis aŭ vidis ion ajn. Nur li vidis, ke io blanka mole falis inter la instruistino kaj la oficiro. En la sama minuto la spronoj de la oficiro jam ektintis laŭ la strato, kaj la instruistino, aspektante malsana, subpremita, pasis preter li kaj eniris la domon. Spas forlasis sian kasejon en la ombro, atingis la lokon, kie staris la geamantoj, kliniĝis kaj vidis sur la tero blankajn rozojn. La rozbukedo, kiu ornamis la bruston de la oficiro estis falinta, sed ili ne rimarkis tion. Spas prenis unu el la rozoj, sed tuj, kvazaŭ li estus farinta ion pekan, lasis ĝin sur la sama loko. Poste li starigis kaj denove ekiris tra la vilaĝo.

Frumatene, antaŭ la sunsubiro, Spas denove sidis sur la benko. Enpensiginta kaj malĝoja, li rigardis ne al la ĝardeno de Gergilan, sed ien antaŭ si. En la sama tempo Radoj, la plej pacema kaj bona el ĉiuj volontuloj, balais kun granda balailo antaŭ la ejo. Lia balailo jam proksimiĝis al tiu loko, kie meze de polvo kaj pajleroj, estis disĵetitaj deko da duonvelkintaj blankaj rozoj. Li estis forbalaonta ankaŭ ilin, kiam Spas levis la manon kaj ekkriis:

— Haltu! Vi ne devas balai tiun ĉi lokon! Lasu la florojn kuŝi tie! Radoj rigardis lin mirigite.

— Ne balai tiun ĉi lokon, ĉu vi aŭdis?

— Sed kial?

— Tial!

Kaj jam pli trankvile li aldonis: — Sur tiu ĉi loko hieraŭ vespere du junaj geamantoj kisis sin. Ili disiĝis. Do, lasu la florojn kuŝi tie, kie ili estas.

Radoj obeis, forbalais ĉie, krom tiun lokon, poste lasis la balailon, kaj, rigardante tien, kien rigardis ankaŭ Spas — al la malgranda nebalaita rondo, kie kuŝis la rozoj, — li ankaŭ sidiĝis kaj diris: — Nu, amiko, diru nun, kio estas.

Per ia fremda voĉo, kian Radoj neniam estis aŭdinta de li, malfor-ta kaj milda, Spas rakontis ĉion, kio okazis hieraŭ vespere, vorton post vorto. Li rakontis kaj Radoj ĉiam pli ofte balancis la kapon kaj sopirĝemis.

Pasis unu-du semajnoj, eĉ pli. Multajn leterojn ricevis la instruistino, multajn leterojn skribis ankaŭ ŝi. Foje — tiel poste oni rakontis al Spas, — ŝi ricevis leteron, sed, nur komencinte legi, ek-ploris, komencis ŝiri siajn harojn kaj svenis. La sekvan tagon ŝi prenis veturilon kaj ien forveturis.

Pelate de sia malsano kaj de ia korpremo, Spas vagadis tra la vilaĝo. Ĉiun tagon li pasis preter la ŝtona muro kaj de supre sin aŭdigis Gergilan. Li staris malantaŭ la rozarbustoj, kiuj jam delonge es-lis finfloritaj kaj, interplektiĝintaj kiel rubusujo, pendis laŭlonge de la muro. Kliniĝinte super ili, kun streĉita vizaĝo, Gergilan diris al li:

— Spas, kio okazis, he Spas! Oni mortigis lin, mortigis tiun ĉi oficiro, la fianĉon de la instruistino. Eĥ, pereas la junuloj, Spas, pereas la kompatindaj!...

Kion Spas povus rediri? Li plirapidigis siajn paŝojn, li volus ne marŝi, sed kuri. Vundo estis en lia animo. Kial tia terura malfeliĉo trafis tiun bonan junulinon? Kial, demandis Spas, kial? La leteron al la inspektoro li jam delonge dispecis kaj ĵetis ĝin en la akvon desur la ponto. Ne estis bonaj novaĵoj. La leteroj, kiujn li ricevis el la hejmo, senesperigis lin, la milito ne havis finon. Pro ĉio ĉi lia malsano akriĝis tiom, ke li devis sen-ĉese iri kaj iri, kiel frenezulo.

Kaj la instruistino revenis en la vilaĝon. Revenis en la aŭtuno, kiam komenciĝis la lernojaroj. Ŝi estis nigre vestita, palvizaĝa, kun rigardo fiksita al la tero. Preterpasante la benkon, kie sidis Spas kaj Radoj, ŝi same kiel antaŭe slautis ilin, sed ne plu ridetis. Tiame Spas saltis de sia loko kaj komencis vagi tra la vilaĝo, kaj Radoj, kies du filoj estis sur la batalkampoj, ĝemspiris kaj liaj okuloj pleniĝis je larmoj.

La instruistino trapasis la ponton kaj ekiris preter la ŝtona muro. Ŝi iris ĉiam tiel, kun klinita kapo, kaj ne plu rigardis supren. Ja ankaŭ la rozarbustoj estis jam sekiĝintaj, polvokovritaj kaj nigraj kiel dor-njoj.

Esperantigis: Lidia RAEVA

1) Lina — karesa virina nomo (de Angelina)

2) Mitjo — karesa virnomo (de Dimitar)

NACIAJ, INTERNACIAJ KAJ REGIONAJ ARANĜOJ DE BEA DUM 1986

N-ro	ARANĜO	Dato	Loko	Organizanto
1.	Ŝakturniro por individua kaj teama ĉampioneco	10.02.—03.03.	Târgoviște	DE de BEA — Târgoviște
2.	Regiona scienc-teknika konferenco „La esperantistaro — konvinkita konstruanto de la socialisma socio“	1.03.	Jambol	DE de BEA, p. k. 25 8600 Jambol
3.	XIX Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto	31.03.—0.2.04.	Razgrad	DE de BEA — Razgrad, bul. „Lenin“ 11, vñ. B, ap. 7
4.	Seminario „25 jarojn de la kosmoflugo de Gagarin	5—6.04.	Vraca	DE de BEA — Vraca
5.	Printempaj festoj de originala kaj traduka prozo „Stranĝa-Sakar—respubliko de la junularo“	13—14.04	Jambol	DE de BEA, Jambol, p. k. 25, 8600
6.	VI Siringa Vespero kaj Konkurso de Originala E-Poezio	19—20.04	Loveĉ	DE de BEA, p.k. 39 Loveĉ
7.	Tagoj de la Amatora E-kreado, dediĉitaj al Trifon Hristovski	10—11.05.	Samokov	DE de BEA — Sofio
8.	Junulara E-renkontiĝo	17—18.05.	Turista Domo „Juneco“ — Târgoviște	E-societo „Eskadrono“
9.	Saniga E-feriado	15—30.05.	Bankja	E-societo „Solidareco“ — Bankja
10.	Nacia E-renkontiĝo de virinoj-aktivulinoj	17—18.05.	Burgas	DE de BEA, Virina Komisiono ĉe CE de BEA
11.	Mara Amika Renkontiĝo Esperantista (MARE)	30—31.05	Varna	E-societo „Albatroso“ — Varna
12.	Internacia Recitalo de Boteva kaj Revolucia Poezio	25.05	Vraca	DE de BEA — Vraca
13.	Internacia scienc-praktika konferenco „La Esperanta gazetaro defende al la Paco“	26.05.	Vraca	CE de BEA, DE de BEA — Vraca
14.	Scienc-praktika konferenco „Fizioprofilaktiko kaj celkonforma vivmaniero“	6—8.06.	Bankja	Medicina E-sekcio ĉe BEA
15.	Ekskurso-ripozo por esperantistoj — rivera kaj mara itinero	16—30.06.	Sofio — Vidin — Ruse — Varna	Turista Sekcio ĉe BEA, bul. „Ĥr. Botev“ 97 Sofio
16.	Aŭtomarŝo	1—10.07.	Târgoviște	E-societo „Eskadrono“, Târgoviște
17.	Turista Esperantista Mara Renkontiĝo	13—19.07.	Burgas	DE de BEA — Burgas
18.	Festo de mon todomo „Esperanto“	15—18.07.	Vitoŝa-monto, montodomo „Esperanto“	UE de BEA — Sofio, str. „Il. Markariopolski“ 4
19.	Internacia Esperantista Ŝakturniro	15—24.07.	Târgoviște	E-societo „Eskadrono“ — Târgoviște

N-ro	ARANĜO	Dato	Loko	Organizanto
20.	IV Internacia Somera E-Universitato	20—25.07.	Veliko Târnovo	DE de BEA, p. k. 266 5000 V. Târnovo
21.	Metodika seminario kaj someraj E-kursoj	1—20.07. 1—20.08.	Pisanica	IEK
22.	Internacia Junulara Esperantista Brigado	1—23.08.	vilaĝo Sadievo, distr. de Burgas	DE de BEA—Burgas
23.	VI Internacia Esperantista Turista Marŝo	9—18.08.	Pirin-montaro	Kiril Ĥlebarov, str. „Goce Delčev“ 8 2850, u. Petrič
24.	Remboata marŝo laŭ Danubo	20.08—2.09.	Vidin-Silistra	Turista Sekcio ĉe BEA
25.	Turista E-Renkontiĝo	23—24.08.	Târgoviște	E-societo „Eskadrono“ — Târgoviște
26.	Turista E-feriado „Studenec“ — 86	26.08.—2.09.	Pamporovo, montodomo „Studenec“	E-societo „Kulturo“ — Smoljan
27.	Internacia Seminario-Ripozo „Tra valoj kaj arbaroj“	18—28.09.	Velingrad	E-societo „St. Kalpazanov“ p.k. 7, Velingrad
28.	Balkanmontara turista marŝo	19—21.09.	Balkanmontaro — la regiono de Sliven	DE de BEA — Sliven
29.	Festo de la fekundeco	27.09.	Razgrad	DE de BEA — Razgrad, bul. „Lenin“ 11, vĥ. B
30.	Scienc-praktika konferenco „Pasinto kaj nuntempo de Esperanto en la Balkanlandoj“	30.09.—1.10.	Pisanica	CE de BEA
31.	Frukta vespero	18—19.10.	Kjustendil	DE de BEA — Kjustendil
32.	Kaŝtana vespero	18—19.10.	Montodomo „Belasica“	K. Ĥlebarov, ul. „G. Delčev“ 8, 2850. Petrič
33.	Internacia Junulara Seminario	29.09.—5.10.	Pisanica	BEJ, bul. „Ĥr. Botev“ 97, 1303 Sofio
34.	Dobruĝana E-renkontiĝo	22—23.11.	Silistra	DE de BEA, p. k. 11,7500 Silistra
35.	Nacia studenta renkontiĝo	13—14. 12.	Pisanica	BEJ, bul. „Ĥr. Botev“ 97, 1303 Sofio

PROGRAMO DE LA INTERNACIA E-KURSEJO (IEK) EN PISANICA POR 1986

1. Seminario kun oficistoj de BEA — 3—7.02.
2. III Internacia Ŝakseminario — 21—30.06.
3. Tradiciaj 20-tagaj instruistaj E-kursoj — 1—20.07.
4. III Internacia Junpionira E-tendaro — 21—30.07.
5. III Internacia Renkontiĝo-Festivalo de E-horoj — 21—30.08.
6. Kvalifika kurso por E-kadruloj el la socialismaj

landoj — 1-12.09.

7. Festo de IEK — 2-5.10.

8. Internacia seminario: „Instruado de fremdaj lingvoj kaj Esperanto“; ekspozicio de instruhelpilaj programoj — 31.10.—6.11.

9. Oratora konkurso — UE de BEA — Sofio — 7—9.11.

10. Novjara internacia renkontiĝo — 29.12.1986 — 2.01.1987



ONI DENOVE AŬDIS PRI SILISTRA

Estas agrable al mi rakonti pri la Unua Dobruĝana¹ Amika Renkontiĝo Esperantista (DARE), okazinta en Silistra la 7-an kaj 8-an de decembro 1985. Post longjara silentado la E-aktivuloj en tiu bela ĉednuba urbo kunvenigis pli ol 150 geesperantistojn el Gorna Orjakhovica, Ruse, Gálábovo, Razgrad, Kurbat, Veliko Tárnovo, Kotel, Gabrovo, Párvomajci, Vraca, Jambol, Varna, Târgoviște kaj Radnevo.

La 7-an de decembro frumatene sur la fervojaj kaj aŭtobusaj stacidomoj atendis la dommastroj. . . Ili enloĝigis la homojn, disdonis mangkuponojn, klarigis programon. Dum la renkontiĝo funkciis E-stando, kie oni povis aĉeti speciale ellaboritajn en Silistra memoraĵojn: pupojn, kalendaraĵojn, vazojn.

En la sama tago la ĉeestintoj metis kronon ĉe la monumento de la fama heroo Dočo Miĥajlov. Poste en la salono de la Sindikata Domo okazis solenaĵo. Ĉeestis pli ol 220 personoj. La ĉeforganizanto de la aranĝo — la sekretario de la Distrikta Estraro de BEA Slavka Obreškova interese prelegis pri la apero kaj disvolviĝo de la E-movado en Silistra. Menciinda estas la fakto, ke jam en 1904 en Silistra aperis libreto „Evoluo de la Internacia Lingvo“ de J. Davidov. Fakte en 1964 Petăr Galčanov kun kelkaj entuziasmaj esperantistoj komencis labori por Esperanto. Kiel fondinto de la loka E-societo li konservis ĝian arkivon kaj hodiaŭ fervore laboras en la E-movado. En la prezidio la veterano okupis sian lokon kune kun Angel Todorov — sekretario de BEA, Mariana Elenova — vicprezidanto de la Junulara Sekcio ĉe BEA, Hristo Dačev kaj Slavka Obreškova de DE de BEA — Silistra, Ivan Čulev — prezidanto de DE de BEA en Sofio. Sekvis salutparoloj nome de CE de BEA, de la estraroj de Bulgara E-Junularo kaj distriktaj estraroj.

Petăr Galčanov rakontis siajn rememorojn — emociajn kaj interesajn. . . Kortuŝa momento dum la solena kunveno estis la enmanigo de la „Honora Insigno“ de CE de BEA al la veterano pro lia sindona kaj valora laboro por Esperanto.

La sekvan tagon oni faris mallongan ekskurson per aŭtobusoj al la historia fortikaĵo de romiaj tempoj — ĉefa tiama defendanto de la urbo, kaj al la naturparko kun muzeo „Srebárna“. En la lago kaj ĝia ĉirkaŭaĵo nestas ĉirkaŭ 160 birdspecoj, kio fakte estas duono de la birdspeca kolekto en nia tuta lando.

Tiu unua tiel amasa aranĝo de la Distrikta Estraro de BEA en Silistra estis ege bone organizita. Ni dankas al la organizantoj pro la fervora laboro kaj agablaj momentoj, kiujn la partoprenintoj travivis en tre agrabla etoso.

M. MIĤAJLOVA

¹Dobruĝano — loĝanto de la nordorienta bulgara regiono, nomata „Dobruĝa“.

NOVA MEDICINISTA E-SOCIETO

La 28-an de novembro 1985 d-rino Staneva, vicdirektoro de la Centra Instituto por Preparo de Mezaĵ Medicinaj Kadroj, akceptis kelkajn funkciulojn de BEA lige kun la fondo de junulara medicinista E-societo en la sama Instituto. Kreiĝis agrabla etoso, kiun la ĉeestantoj transportis en la salomon plenan de ge-studentoj kaj geinstruistoj.

D-rino Staneva prezentis la gastojn. Inĝ. Petăr Todorov, vicprezidanto de BEA, rakontis pri la Esperanto-movado ĉe ni kaj eksterlande kaj pri la perspektivoj de la Internacia Lingvo. Li esprimis sian dankon al la multnombraj ĉeestantoj pro la manifestita intereso al Esperanto. Al la novelondita societo li promesis helpojn fare de BEA; Inĝ. Angel Todorov — sekretario de BEA kaj ĉefdirektoro de la Internacia E-Kursejo, invitis ĉiujn partopreni la E-kursojn en IEK venontjare kaj parolis pri la celoj kaj taskoj de tiu unika en la mondo Esperanto-lernejo; la ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ Dončo Hítrov salutis la ĉeestantojn kaj bondeziris al ili grandajn sukcesojn sur la Esperanto-kampo.

La nova E-societo portos la nomon de la usona knabino Samanta Smith, tragiike pereinta, kiu batalis por paco kaj amikeco inter la usona kaj sovetaj popoloj.

La komsomola sekretario Petja Miĥova tralegis promeson de la societanoj pri plenumo de la decidoj de 41-a kongreso de BEA kaj pri inda renkontiĝo de la XIII kongreso de BKP.

Vasja Cvetkova — sekretario de MEM, informis la ĉeestantojn pri la „Apelo el Hiroŝima kaj Nagasaki por totala malpermeso kaj elimino de la nukleaj armiloj“ kaj esprimis sian esperon, ke ĉiuj partoprenos la subskriban kampanjon sub tiu apelo.

Al la nova societo — multajn sukcesojn!

V. PETROVA

RİCHENHAVA EKSPOZICIO

En la urba ekspozicia halo la E-societo „Trifon Hristovski“ — Pomorie, aranĝis ekspozicion pri temo: „Per Esperanto al mondpaco kaj tutmonda amikeco“. La ekspozicio estis dediĉita al la nova lernojaro kaj al la centjariĝo de Esperanto.

Ĉe la malfermo fine de oktobro pasintjara, la societa prezidantino Alis Konstantinova prelegis pri la Internacia Lingvo kaj pri ties disvolviĝo. Ĉeestis reprezentantoj de la lokaj sociopolitikaj organizaĵoj. La sekretario de la Komunuma Komitato de la Bulgara Komunista Partio Stojan Ralev gratulis la esperantistojn pro la riĉenhava kaj bone aranĝita ekspozicio. Grandan impreson al la ĉeestantoj civitanoj kaj gelnantoj faris la interesa korespondado de la lokaj esperantistoj kun samideanoj el la tuta mondo. Estis ekspoziciitaj multnombraj bildkartoj el preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj, eĉ el foraj Japanio, Peruo kaj Aŭstralio. La vizitantoj admiris la donacetojn, poŝtmarkojn, revuojn, gazetojn, librojn, insignojn k. a., kiujn la esperantistoj el Pomorie ricevis de siaj eksterlandaj amikoj.

Dum 13 tagoj la ekspozicio altiris la atenton de la urbanoj kaj ludis grandan rolon por popularigo de la Internacia Lingvo en tiu bela nigramara ripozloko.

Smaragda JANEVA

SOCIETO-JUBILEULO

La 19-an de novembro pasintjara en la Kulturdomo ĉe la entrepreno de blinduloj en Varna kolektiĝis multaj geesperantistoj. Ili solene festis la kvinan datrevenon ekde la fondiĝo de societo „Espero“ — la societo de la blindaj esperantistoj.

La prezidanto Dimo Penev konigis al la ĉeestantoj la mallongan, tamen riĉenhavan historion de la societanoj. Dum tiuj kvin jaroj la membraro duobliĝis. Ĉiujare oni organizas kurson por komencantoj aŭ por progresintoj. La plejmulto de la membroj estas spertaj esperantistoj. Ofte ili partoprenas urbajn kaj naciajn arandojn. Ĉu oni povus forgesi la bonegajn kantistinojn Elena Kojuharova kaj Bonka Stefanova, gajnintaj altajn premiojn en diversaj E-festivaloj aŭ la bonajn deklamantojn Dimo Penev, Boris Bodiĉev kaj Marin Iliev. Kiel tre iniciatmaj kaj agemaj esperantistoj montriĝis samideanino Veselina Ĥineva — la plej nova membro de la societo kaj la sekretario ĉef. V. Ivanova.

Bonajn kontaktojn la estraranoj subtenas kun la partia kaj sindikata organizaĵoj en la entrepreno kaj ĉiam la societo ĝuas solidan helpon fare de ili.

La blindaj esperantistoj de societo „Espero“ aktivas ankaŭ internacie. Ili havis siajn reprezentantojn en la kongresoj de blinduloj okazintaj en Zagreb (1981), Budapeŝto (1983), Tirenja (1984) kaj Aŭgsburgo (1985).

Oni salutis la jubileulojn en la nomo de societo „Albatroso“ kaj la Internacia E-Kursejo.

En la nomo de DE de BEA-Varna festparolis D. Trăpkova.

Fine la kursgvidantino Saŝa Nedeva disdonis diplomojn kaj insignojn al la esperantistoj de la lasta E-kurso por progresintoj.

Sekvis riĉa arta programo, plenumita de la jubileuloj.

S. TODOROVA

INTERNACIAJ ARANĜOJ

SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO

27.VI—3.VII.1986, Gyula — Hungario

Jam la 24-an fojon atendas vin la Somera Esperanto-Universitato en malgranda hungara urbo Gyula, organizita de Asocio por Disvastigo de Sciencaj Konoj. Krom la tutsemajna esperantlingva programo atendas vin: kuracbanejo, mezepoka burgo, muzeoj de Gyula. Oni povas partopreni prelegojn pri diversaj sciencaj temoj, ekz. F. Liszt, pri la hodiaŭa Hungario, daltonismo, birdaro de Nederlando, fonetiko de Esperanto, geologiaj demandoj kaj aliaj. La programon kompletigas tri sekcioj: pedagogia-didaktika, medicinista kaj kooperativisma. Tiuj proponas al vi prelegseriojn pri la koncerna temo. Vi povas partopreni tutagan ekskurson, piknikon, teleskopon rigardadon, lingvoekzamenojn, filmposttagmezon, orgenkoncerton, folklorajn programojn. Petu la programkajeron — ni volonte sendos!

Adreso, infompeto:

TIT Városi Szervezete, Somera Esperanto-Universitato H-5700 Gyula, 48-as u. 11. — Hungario

ENHAVO

Speciala pacpremio de UEA	11
Ing. PETAR TODOROV. Nia asocio antaŭ la XIII Kongreso de BKP	1
Ing. IVAN PACOV. Komputiloj kaj instruado de Esperanto	2
GEORGI MIHALKOV. Riĉa eldonagado — valoraj kaj interesaj libroj	3
CV. TODOROV. La donacemo — bela popola tradicio	4
STEFKA ĈENKOVA. Krăstju Karucin — vivanta enciklopedio de BEA	5
MARIA JANKOVA. Ne ĉesas la leteroj	6
71-a UK en Pekino Kongresa komunikado	7
BERNARD GOLDEN. Kion bezonas la sciencistoj: la lingvon Esperanto aŭ la kodon Internacia Lingvo?	7
HO-MO-GO. En la lando de lotusfloroj	8
CANKO MURGIN. Sur la vojstrekto „Ho Shi Minh“	9
VENETA BALEVA. Bonŝancon, „Ovo!“	9
Doc. ing. STOJČO STOJČEV. Faka libro en Esperanto	10
JORDAN JOVKOV. La blankaj rozoj	12
Naciaj, internaciaj kaj regionaj arandoj de BEA kaj Programo de la Internacia Esperanto-Kursejo dum 1986	14

Sur la kovrilpaĝo:

Nacia parko „Vitoŝa“ — la loko „Oraj Pontoj“

Foto: Dimo DIMOV

VJETNAMAJ NOVAJOJ

La 25-an de aŭgusto en Ho Chi minh, en Nha Van Hoa Thanh Nien estis organizitaj de E-klubo kaj Kulturdomo de Junularo — renkontigo kaj prelego de F. Simonnet kun junuloj. La salono estis plena de ĉeestantoj. Oni povis legi grandan sloganon „Ĝis baldaŭ en Varsovio por la 100-jara jubileo de Esperanto (1887—1987). F. Simonnet prelegis pri temo: „La Internacia Lingvo kaj la E-Movado en la mondo“.

Partoprenis la centraj komitatanoj de V. P. E. A. — N. Minh Kinh, N. Hai Trung, gesamideanoj H. Minh Phung, N. Do Khanh, Ngo Chan Ly, Luu Hoang Hai, E-klubanoj, gemembroj de Amikeca Klubo (Clb Huu Nghi), neesperantistoj kaj simpatiantoj de Esperanto.

Dum tri horoj nia konata franca amiko E-aktivulo F. Simonnet faris tre interesan prelegon antaŭ la junuloj kaj konversaciis, intersanginte spertojn kun Vjetnamaj geesperantistoj.

La kunveno finiĝis per neforgeseblaj, emociaj momentoj.

Nguyen Do KHANH,
E-Klubo HO CHI MINH V. N.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Mariana ELENOVA,

Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIHAL-

KOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV

Teknika redaktoro: Ljubomir LAZAROV

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril i Metodij“ — I grado Eldonkvanto — 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303-Sofio, Bulgario

P. K. 66

1000-Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

Sur la monda pinto de la virina ŝako

Ankoraŭ gimnazia lernantino, la eta *Susana Polgár* altiris al si la atenton de la ŝakista mondo. Ankoraŭ 15-jaraĝa, ŝi sinsekve jam du fojojn suprenkuris al la unua loko de la monda ranglisto. Pasintjare atribuis al ŝi la Internacia Ŝakista Federacio (FIDE) la altan titolon *vira internacia majstro*, kio estas ega escepto inter ŝakistinoj. *Ŝi estas esperantistino.*

Ĉio ĉi kompreneble venis post abundo de antaŭaj sukcesoj. Estinte 12-jara, en internaciaj virinaj turniroj ŝi superis grandmajstrojn kaj plenumis la normojn de ĉiuj majstro-titoloj por ŝakistinoj. Oni povus diri, ke tio ne estis por ŝi malfacila — ja, ŝi havis nur 10 jarojn, kiam oni registris ŝin „virina ŝakmajstro“.

Neniam antaŭe okazis io simila! Kompreneble ŝi daŭre staris je la pinto de la Hungarlanda ranglisto de la ŝakistinoj. Tio estis des pli klara, ĉar tiutempe ŝi ofte venkis eĉ dum viraj turniroj, kaj konkursis kun multe da sukcesoj sur la gvidaj tabuloj de la ĉampionteamo MTK-VM.

Ĉu tiu surprizega ŝak-kariero progresos, kaj ĝis kiu grado, tiurilate la respondojn ni ricevos dum la venontaj jaroj. Kaj tre verŝajne, ŝiaj konkurantoj, kiuj eventuale superos ŝiajn sukcesojn, troveblas ene de ŝia familio. Ili daŭre lernas unu de la alia kiel bonaj fratinaj, neniam inter ili aŭdeblas kverela vorto. *Judit*, ankoraŭ 8-jara, jam eminente ludas eĉ „fulm-rapidajn“ partiojn, kaj kune kun la 10-jara *Sofia*, ofte akiris unuajn lokojn de „fulmturniroj“ (5-minuta pripensado permesata) inter „grandaj“ konkursantoj.

— *Kio estas la ŝlosilo de la eksterordinaraj rezultoj de viaj filinoj?* — mi demandis ilian patron, *László Polgár*, psikologo-pedagogon.

— La ŝlosilo troveblas verŝajne en nia bone bazita edukistemo. Ankaŭ mia edzino estas mezlerneja instruistino pri la germana, rusa kaj Esperanto lingvoj. Nia celo estas pleje disvolvi la kapablojn, kiujn havas niaj filinoj. Jam en la aĝo de 4—5 jaroj ni kondukis ilin al la „serioza ludado“, por ke ili ekkonu la plezurajn de la scio, de la malkovrado kaj penso. Ili havas multajn geamikojn tra la mondo, precipe ŝakludantojn. Multe ili korespondas, ankaŭ Esperantlingve.

— *La internacia ŝakliteraturo estas ege vasta en multaj lingvoj. Ĉu vi kapablas studi sufiĉe da ili?* — mi demandis *Susanan*.

— Mi lernis frutempe Esperanton de mia patrino, poste aldoniĝis la germana kaj la rusa lingvoj. Oni ofte invitis min konkursi al Bulgario, kie mi kun granda emo alproprigis la bulgaran lingvon. Tiu ne montrigis malfacila por mi, ĉar mi multe okupiĝis pri la parenca rusa lingvo, ja mi studadis la sovetajn ŝaklibrojn kaj revuojn, eĉ paroli mi havis ofte eblon dum konkursoj en Moskvo.

Esperanto helpis min kiel bazo por lerni aliajn lingvojn. Dum kelkaj monatoj mi ellernis ekzemple la anglan ĝis tia grado, ke nun bone komprenas la anglalingvajn ŝaklibrojn kaj la abonitajn fakrevuojn.

— *Certe vi partoprenis jam turnirojn de Esperanto-organizaĵoj, ĉu ne?*

— Memkompreneble, plurfoje mi ludis dum tiuj, ekzemple en Ĉeske Budejovice, Varna, Targovište kaj aliloke. Ankaŭ Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (EŠLI) ne malofte organizas tiajn. Miaj fratinaj nun preparas sin por la turniro de E-ŝakistoj en Weimar, GDR. Cetero, kie ajn mi konkursas, mi renkontiĝas kun geamikoj-esperantistoj, ja mi havas tutmonde multajn. Mi sukcese konvinkis jam plurajn gravajn ŝakistojn, eĉ grandmajstrojn, pri la utileco de la Internacia Lingvo. Jam Esperante ni interparolas...

— *Susana volonte verkas fakajn artikolojn — menciis ŝia patro. — Ŝi redaktas jam ŝakrubrikon por magazino, eĉ verkas faklibrojn. Kelkaj estas pretaj jam en manuskripto. La Scienca Eldona Centro de UEA pretas eldoni tiun, kiun ŝi verkis en Esperanto.*

— *Mi povas nur gratuli, kara Susana, pro la alta sukceso: dufoje stari sur la pinto de la virina ranglisto de la mondo en via aĝo! Interese, aŭdeblis ankaŭ riproĉoj, ĉar vi konkursas nur en viraj turniroj!*

Cetero mi, kiu — bone kompreneble — preferas la pli fortajn kontraŭulojn kaj la malfacilajn konkursojn, pretas ludi kun virinoj. En majo mi faris sukcesplenan simulan ludon en Vieno kontraŭ membroj de la Aŭstria nacia virina teamo. Mi venkis ĉiujn dek ŝakistinojn, kvankam ili montris altajn ludkapablojn. Nun, en la plej frua ranglisto, mi troviĝas sur la 2-a loko, kelkajn poentojn post la soveta mondĉampionino Ĉeburidanidze, kaj min sekvas Cramling.

— *La legantoj de „Hungara Vivo“ interesiĝos ankaŭ pri viaj lastatempaj ŝakrezultoj dum turniroj!*

— Turniroj tre altiras min — ju pli malfacilaj ili ŝajnas pro la „timigaj“ konkursantoj, des pli mi preferas ilin. Kiel membro de la hungara ĉampionteamo, ĉi-jare mi venkis 5-foje el ok partioj, la restintaj iĝis sendecidaj. Tio signifas tre altan, pli ol 80% sukceson. En Budapeŝto okazis nekufima, aligrada turniro de 20 majstroj, kun templo de nur 30 minutoj. En ĝi mi havis la unuan lokon antaŭ la hungara vira ekŝampiono Forintos kaj internacia majstro Petrán.

— *Miaj filinoj vivas feliĉan, agrablan infanaĝon — prenas la vorton denove ŝi — ano Polgár. — Plezuron kaj gojon ili ĉerpas kaj el la ŝakludo, kaj el la multe ŝatata Esperanto, kiun uzi-utiligi ili neniam preterlasas, se nur iomete tio eblas. Ni, gepatroj instigas ilin elekti realajn celojn, vivi kiel sporton ŝatantaj kaj honestaj homoj.*

E. F.

(El „Hungara Vivo“, n-ro 4, 1985)

STUDENTA FESTO

Unu el la plej gravaj taskoj de Junulara E-Sekcio ĉe BEA estas propagandi la Internacian Lingvon inter la neesperantista bulgara junularo. Tiucele lige kun la Internacia Tago de Studentoj, la sekcio estraro okazigas la jam tradiciajn ĉiujarajn Studentajn Tagojn en IEK-Pisnica.

La lastajn Tagojn (6-8.12.1985) partoprenis 200 gejunuloj el urboj Sofio, Plovdiv kaj Smoljan. Oni interkonatiĝis, diskutis pri Esperanto, dancis kaj amuziĝis, interparolis pri siaj studoj kaj vivproblemoj. La riĉenhava programo kaj la bela muziko kreis vere bonan atmosferon.

La studentoj aktive partoprenis la kvizon pri la E-movado en nia lando kaj eksterlande kaj pri la aktivado de junaj esperantistoj. Kun granda intereso ili eksciis de Cvetka Miteva, prezidantino de la Junulara E-Sekcio, kiu gvidis la kvizon, pri la kreinto de la Internacia Lingvo — d-ro L. L. Zamenhof, pri la 100-jara jubileo de Esperanto kaj pri la internaciaj kongresoj en Augsburg kaj Eringerfeld. La esperantistino Neli Abagieva rakontis interesajn travivaĵojn pri sia antaŭnelonge okazinta vojaĝo en Suda Ameriko.

La estontaj ekonomiistoj, biologoj, juristoj forportis en siaj koroj la sinceran amikan etoson, kiun oni kreas dank' al la Internacia Lingvo.

Vera RAJKOVSKA